

Revuo
ESPERANTO

Internacia

N-ro 568 (3)

MARTO 1953



(klišo : Adolf Schaer)

Thun, Svislando (vidu paĝon 97)

Ĉion pri administrado de UEA kaj de la
revuo ESPERANTO, abonado, reklamoj,
anoncetoj sendu al
UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO
Heronsgate, Rickmansworth, Herts.,
Anglujo

Oficiala organo de
Universala Esperanto-Asocio

Fondinto : H. HODLER

Redaktoro : HANS JAKOB

Helpredaktoro : MASON STUTTARD

Jara abono (1953) : 15 ŝil. anglaj (kun
membreco kaj jarlibro 20 ŝil.)
Ĉefdelegitoj kaj Perantoj en multaj landoj

Tarifo por reklamoj :

1 paĝo £6 ½ paĝo £3
¼ paĝo 30 ŝil. ⅙ paĝo 15 ŝil.

Anoncetoj pri korespondado :

2 pencoj por unu vorto aŭ 1 int. respond-
kupono por ĉiu duo da vortoj

Legantoj en 80 landoj

Eldonnumero 6000

Traduko kaj represo de artikoloj estas
permesataj, kondiĉe ke oni citu la fonton.
Oni sendu tian represaĵon al nia redakcio.



Enhavo

Specialaj artikoloj :	paĝo
Krizo de nia Literaturo : <i>D-ro Ivo Lapenna</i> ..	81
Nia Membraro : <i>C.C.G.</i> ..	86
Kiel vigligi niajn grupojn : <i>André Albault</i> ..	88
Ferdinand Hodler : <i>Hans Jakob</i> ..	95
Topografia kaj historia unikaĵo : <i>Fritz Schwarz</i> ..	97
Pri estetika aprezo de lingvoj : <i>Juliano Tuwin</i> ..	99
Strangaj Bestoj en Aŭstralio : <i>P. E. Schwerin</i> ..	103
Belartaj Konkursoj 1953 ..	98
38a Universala Kongreso :	
Oficiala Komunikado N-ro 4 ..	89
Susak—kurioza adriatika insulo : <i>Marinko Gjivoje</i> ..	90
Konstantaj Rubrikoj :	
Centro de Esploro kaj Dokumentado ..	93
Enigma Konkurso ..	108
Esperantista Vivo ..	112
Internacia Konkurso ..	87
Nia Forumo ..	92
Oficiala Informilo ..	110
Radio kaj Esperanto ..	109
Tra la Mondo Esperantista ..	84

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 568 (3)

Marto 1953



Krizo de nia Literaturo

“La deziro paroli en la lingvo amata estis tre forta. La timo, ke eble ne troviĝos sufiĉe da personoj, kiuj pretos aŭskulti, ne malpli senkuraĝiga.”

(El Antaŭparolo al la verko Aktualaj Problemoj.)

EN la rubriko de CED ni aperigas en tiu ĉi numero de nia gazeto mallongan resumon pri la bibliografio de Esperanto-eldonaĵoj en la jaro 1952.

Tiu seka, cifera resumo klare montras, ke nia literaturo suferas seriozan malsanon. Kompare kun la antaŭaj jaroj, precipe kun la antaŭ-militaj, la jaro 1952 estis mizere dezerta kaj koncerne la kvaliton kaj koncerne la kvanton. Fakte, el 83 diversaj publikaĵoj, eldonitaj en la pasinta jaro, 51 apartenas al lerno-libroj, vortaroj, legolibroj, nacilingva informado, Esperanto-Movado, turismaj kaj aliaj prospektoj. Restas entute nur 32 publikaĵoj, kiujn oni povas konsideri kiel literaturon en la plej larĝa senco de la vorto. Eĉ tiu limigita nombro bedaŭrinde konsistas nur el kelkaj signifaj verkoj, dum la granda plimulto havas vere nenian aŭ nur minimuman kulturen valoron.

Tion oni devas honeste konstati kaj kuraĝe diri. Nia Movado estas hodiaŭ tro serioza por esti nesincera al si mem kaj por trompi sin per kvazaŭaj sukcesoj. Des malpli, ke oni facile povas analizi la kaŭzojn de tiu provizora krizo kaj trovi la rimedojn por forigi ĝin.

I

Ambaŭ problemoj—la kvalito kaj la kvanto—havas la saman ĉefan fonton: ne sufiĉan interesiĝon de la Esperantlingva publiko por la propra literaturo ĝenerale kaj absolute ne-kontentigan apogon al la elstaraj verkoj, speciale. Ju pli signifa estas la verko el arta aŭ scienca vidpunkto, des pli malbone por la eldonisto! La ajn sensacia detektivromano kun abundo da murdoj, aŭ ia sentimentala triaranga amnovelo kun multe da intrigoj disvendiĝas nekompareble pli rapide kaj pli bone ol sendiskute valora verko. Por la unua tipo de niaj eldonaĵoj mi ne deziras ĉi tie doni ekzemplon. Sed pri la dua mi ne povas ne mencii, ke, ekzemple, la libro kun la prelegoj de la Internacia Somera Universitato en Malmö, eldonita antaŭ pli ol 4 jaroj, disvendiĝis ĝis nun en ne pli ol 600 ekzempleroj! Similan malgloran sorton havas kutime ankaŭ aliaj vere valoraj verkoj de nia literaturo.

Tia stato sur la merkato de la Esperanta libro kaŭzas, ke la eldonistoj ĉiam malpli kaj malpli emas publikigi altkvalitajn—ĉu originalajn, ĉu tradukajn—literaturaĵojn. Ili sentas sin devigataj—eĉ kontraŭ sia

volo—limigi sin al bagatelaĵoj. Se tiuj bagatelaĵoj, krome, estas skribitaj per “basic” Esperanto de kelkcento da radikoj, des pli bone! Pro la komencantoj, kompreneble! Tiamaniere la “prokomencanta” kriterio (tiuj niaj eternaj komencantoj!), kiu jam kaŭzas sufiĉe da malbono al la kultura enhavo de niaj grupoj, komencas influi eĉ la kvaliton de nia literaturo.

II

Estas necese substreki tre forte, ke neniu decida radiko de la aktuala krizo estas trovebla aliloke.

Ni disponas pri relative konsiderindaj kreaĵfortoj. Ni havas proporcie multe pli da talentaj verkistoj, poetoj, tradukantoj kaj rimarkindaj sciencistoj, kapablaj konstante kaj abunde riĉigadi nian literaturon, ol da personoj povantaj konsumi iliajn spiritajn produktojn. Sed malfeliĉe, en la nunaj kondiĉoj, iliaj potencialaj verkoj restos por ĉiam nur potencialaj aŭ atingos en la plej bona okazo sole la formon de manuskripto. Tio jam trafis multajn verkojn, ekzemple la kvardekon da altnivelaj prelegoj, faritaj en la Internacia Somera Universitato kaj verkitaj originale en la Internacia Lingvo de tre kvalifikitaj kompetentuloj.

Estas ankaŭ oportune publike diri—por skui ĉies konsciencon—ke kelkaj sindonaj aŭtoroj trovis la necesan kuraĝon ne nur por verki en Esperanto, (korektante, plibonigante, ĉizante kaj cizelante eble eĉ dum pluraj jaroj), sed ankaŭ por eldoni je siaj propraj kostoj kaj risko, aŭ por eldonigi sub la samaj kondiĉoj pere de amikoj—forprenante ne malofte de sia buŝo la necesajn financajn rimedojn—valorajn originalajn aŭ tradukajn literaturaĵojn. Grandparte ĝuste al tiu fakto ni dankas kelkajn verajn

juvelojn, kiuj estis publikigitaj en la lastaj jaroj. Pri tiuj perloj de nia literaturo ni ĉiuj prave fieras; ili grave kontribuas al la kultura valoro de Esperanto; tra ili evoluas la lingvo; en la medioj de kulturo, scienco kaj edukado—ekzemple en UNESKO, pri kio mi ankoraŭfoje certiĝis antaŭ nelonge—ili estas por la afero de la Internacia Lingvo pli konvinkaj ol la plej elokventaj argumentoj; sed ĝuste ilin—ĉu paradokse—la Esperantista publiko tamen ne apogas efektive, nome per aĉetado.

La aserto, ke la Esperantistoj estas ĝenerale malriĉaj personoj kaj ke tial suferas nia literaturo, estas nur supraĵa preteksto. La Esperanta libro estas meze multe malpli kosta ol samvalora nacilingva verko. Tio estas nekontestebla fakto. Aliflanke, kvankam certe ne riĉaj, sole tiuj Esperantistoj, kiuj ĉeestas unu UK elspezas por tiu celo proksimume centmil anglajn pundojn ĉiujare. Se nur 5% de tiu sumo estus donata por nia literaturo, ni povus ĉiujare sen malfacilaĵoj publikigi plian dudekon da altvaloraj verkoj. Kaj tio per si mem certe sufiĉus por venki la nunan krizon!

III

La rimedoj por solvi kontentige kaj rapide la problemon estas pluraj:

(1) Antaŭ ĉio estas necese krei aŭ plifirmigi la *konscion pri la graveco de la Esperanto-literaturo* kaj samtempe larĝe evoluigi *profundan amon al la Internacia Lingvo*. Neniu lingvo, neniu literaturo en kiu ajn lingvo povas prosperi sen amo kaj respekto de la uzantoj. Ni prave postulas, ke oni respektu la Internacian Lingvon. Sed antaŭ ol ni tion postulas de la aliaj, ni mem devas kondukti tiel. Ni pretendas, same prave, ke Esperanto estas kultura lingvo. Ni tamen

memoru, ke iu lingvo estas per si mem nek kultura nek primitiva. La grado de ĝia kultureco dependas de la kulturaj valoroj, kiuj estas kreataj en ĝi kaj pere de ĝi. Kaj tio, siavice, dependas de la kultura nivelo de ĝiaj uzantoj. Konscii pri tiu fakto jam estas simptomo de klereco. Kaj pri ĝi, mi estas certa, ni ĉiuj konscias. Se estas tiel, tiam ni devas tuj entrepreni grandskalan kampanjon prezentante ĉie—de la porkomencantaj kursoj, tra la grupaj kunvenoj ĝis la Universalaj Kongresoj—la signifon de la Esperanto-literaturo. Ekami, respekti kaj efike subteni la Esperantan libron—jen la celo de tiu kampanjo. Estas dezirinde, ke ĝi komenciĝu senprokraste kaj sen plua instigado.

(2) Nia librokritiko devus malpli paroli pri la kvalitoj de la papero, pri la teknika aspekto kaj pri la preseraroj, sed multe pli pri la arta aŭ scienca valoro de la kritikata verko. La fundamenta kriterio devus esti: la signifo de la verko por la riĉigo de la *kultura enhavo* de la Internacia Lingvo.

(3) Ĉiu grupo devus regule aĉetadi absolute ĉiujn iom signifajn Esperantajn librojn. Hodiaŭ ekzistas ĉirkaŭ mil funkciaj Esperanto-grupoj en la mondo. Se ĉiu senescepte plenumus jam en tiu ĉi monato tiun sian *elementan devon*, la problemo estus solvita en nuraj kelkaj tagoj.

(4) La grupoj devus instigi la ĉefajn bibliotekojn de sia urbo havigi al si almenaŭ la plej signifajn Esperantajn librojn. Oni postulu, ke la *Esperanto-libro estu tiurilate egalrajta* al samkvalita libro de kiu ajn alia lingvo.

(5) Fine, restas la individua Esperantisto. En tiu ĉi gravega afero ĉiu, sed fakte ĉiu senescepte, povus kaj, mi kuraĝas diri, devus kontribui. Se iu provizore ne havas sufiĉe da tempo por legi, se alia ne havas multe

da intereso por la literaturo, tio ankoraŭ ne estas praviga kaŭzo por ne havigi al si almenaŭ malgrandan hejman bibliotekon. Tiaj personoj konsideru, ke eble baldaŭ ili trovos tempon, ke la interesiĝo venas legante kaj ke, ekster tiuj argumentoj, en ĉiu okazo ili kontribuas al la kresko de la Esperanto-literaturo, al riĉigo de la lingvo, al ĝia disvastigo *per la nura fakto, ke ili aĉetas Esperantan libron*.

Kaj koncerne la elspezoj por la libroj mi diru, ke estus grandega sukceso, se nur ĉiu leganto de tiuj ĉi linioj donus *por sia literaturo*, por la Esperanto-literaturo tiom, kiom li donas ĉiujare por sia taggazeto. Ŝajnas al mi, ke konscia Esperantisto povus taksi la Esperantan libron almenaŭ tiom, kiom la nacilingvan ĵurnalon, kiun li forĵetas tra leginte kelkajn novaĵojn.

* * *

Dum la Pariza Konferenco de UNESKO al la delegitoj estis prezentataj ankaŭ diversaj valoraj Esperantaj libroj. Ĉiuj montris grandan interesiĝon ĝuste pri nia literaturo. Okazis, ke unu el la delegitoj, foliumante Peer Gynt kaj kelkajn aliajn altkvalitajn verkojn, iom surprizite demandis: “Kiu subvencias tiajn eldonojn?” Lia surprizo estis ankoraŭ pli granda pro la respondo: “Neniu. Estas la Esperantistoj, kiuj, aĉetante tiajn librojn, ebligas ilian publikigon en al Internacia Lingvo.” La Esperantistoj devus ne dementi tiun respondon.

Tia estas la stato kaj tiaj la ĉefaj rimedoj. La Bibliografio por 1952 tamburas alarmon. Ĝi eĥu en ĉies koroj, kiuj batas por la alta idealo de la Internacia Lingvo kaj de tiu idearo, kiu estas esence ligita al ĝi kaj al kiu apartenas ankaŭ la konstruo de tuthoma kulturo. *D-ro Ivo Lapenna*



Tra la Mondo Esperantista



Aŭstrujo

Valoran laboron plenumas nia ano d-ro Oskar Meister en Graz: inter aliaj laboroj li publikigis dum la tuta jaro en la gazeto por invalidoj *Die Quelle* (La Fonto) biografiojn de invalidoj, kiuj laboras malgraŭ sia kriplesco kiel famaj kuracistoj, teknistoj, artistoj k.t.p. D-ro Meister aldonas al ĉiu artikolo Esperanto-tradukon kaj per tio atentigas neesperantistojn pri nia lingvo. Krome li tradukas folkloristajn artikolojn el nia revuo germanlingven kaj donas la tradukojn al la direktoro de la folkloro muzeo en Graz, prof. Koren, kiu kolektas ilin por scienca uzo.

Belgujo

Dum la pentekostaj tagoj okazos en Antverpeno kongreso organizata de Flandra Ligo Esperantista, la nederlanda ligo L.E.E.N., kaj Reĝa Belga Ligo Esperantista. Per tiu Beneluksa Kongreso la tri ligoj esperas plifortigi la kontakton inter la esperantistoj de tiuj landoj.

La komitato, elektita de la tri ligoj, jam tre bone laboris kaj aranĝis tre allogan programon. La intereso estas granda; jam komence de januaro pli ol 100 kongresontoj aliĝis. Kompreneble alilandanoj estas bonvenaj. Kongreskotizo: 50 B.fr. Aliĝiloj akireblaj ĉe la tri ligoj. Ĉiuj aliaj informoj ĉe la sekretario: S-ro H. Sielens, Houwerstraat 12, Antwerpen, Belgujo.

Danlando

Centra Dana Esperantista Ligo kaj Dana Laborista Esperanto-Asocio okazigos komune jarkunvenon en Kopenhago en la tagoj 23-25 majo 1953. Ampleksa kaj interesa programo estas planita—poezia konkurso, fakkunvenoj, vizitoj en la urbo, granda revuprezentaĵo kaj balo. Ni ŝatus partoprenon de eksterlandanoj kaj aranĝus plej bone por tiuj, kiuj aliĝos. Partopreno kaj restado estas malmultekosta en nia urbo. Skribu kaj petu informojn ĉe Esperanto Aarsmødet 1953, Postbox 1301, København Valby, Danlando.

Francujo

Universitata rektoro Guillon, la urbestro de Montpellier s-ro Boulet, kaj diversaj aliaj profesoroj kaj prezidantoj ĉeestis la solenan malfermon de Esperanto-kurso en la Supera Komerca Lernejo de Montpellier. Gvidas la kurson s-ro R. Llech-Walter.

Nederlando

En *Esperanto* n-ro 565 troviĝas la himno de la Veterana Esperantista Klubo. Ĝi finiĝas per la vortoj

Ho, junuloj, sekvu nin!

Al tiu alvoko jam respondis la junular-grupo en Zeist, kiel oni vidas de la foto farita okaze de la Zamenhof-



La junulinoj en Zeist ĉe Zamenhof-festo

festo en Decembro. Responde al informpeto pri tiu grupo la sekretario de la sekcio Zeist de L.E.E.N. skribis:

“La sekcio Zeist donas ĉiujare propagand-vesperon en septembro. Post tiu vespero en 1951 mi komencis kurson por 4 knabinoj 14-jaraj. In aprilo 1952 ankaŭ komencis 6 knabinoj 12-jaraj. Post nia propaganda-vespero en 1952 nia junulargrupo grandiĝis ĝis 16 knabinoj. Ĝi nun konsistas el 16 knabinoj de 12 ĝis 21-jaroj. La pli granda parto certe intencas fari ekzamenon kaj mia opinio estas veraj Esperantistinoj.

Estas por nia nova grupo granda honoro, ke estas permesate al ni prizorgi parton de la festvespero dum la Beneluksa Kongreso je Pentekosto.”

Nov-Zelando

La 18-a N.Z. Esperanto-Kongreso okazis en Auckland je la jarfino. Parlamentano S-ro W. T. Anderton malfermis la plej grandan kongreson de la postmilitaj jaroj, kun 68 ĉeestantoj.

Laŭ kongres-decido N.Z.E.A. distribuos 25,000 flugfoliojn dum la jaro 1953. La Kongreso ankaŭ decidis donaci £5 al CED.

Aliaj decidoj faritaj dum la kongreso estis, ke N.Z.E.A. elektu komitaton kies celo estas organizi novajn klubojn speciale per korespond-kursoj, kaj ke grupo de lerneĵ-instruistoj formu NZ-grupon de I.L.E.I.

J. S. Allan

Esperantlingvaj resumoj

Ni ricevis ekz. de *l'Igiene moderna*, bela revuo publikigata de Istituto d'Igiene, Viale Benedetto XV, Genova, Italujo. Kun plezuro ni rimarkis en ĝi esperantlingvajn resumojn de la artikoloj. Ni rememorigas ke aliaj medicinaj revuoj, inter ili *Journal de Médecine de Lyon* kaj *Acta Orthopaedica Belgica* jam delonge regule presigas esperantlingvajn resumojn.

K.

Nia Membraro

SUBE troviĝas la laŭlanda membrostatistiko je la fino de 1952, el kio eble la plej interesa konstato estas ke la lando kun la plej granda nombro da membroj por la unua fojo ne estas en Eŭropo. Tiu honoro translokiĝis al Brazilo, al kiu ni kore gratulas, kvankam ni opinias ke en Eŭropo ekzistas minimume tri

landoj kiuj povus atingi pli altajn ciferojn.

Alia interesa konstato estas, ke malgraŭ la grandaj perdoj en Ĉeĥoslovakujo, Hungarujo kaj Pollando la membronombro kreskis je pli ol mil kompare kun antaŭ unu jaro.

Membroj de U.E.A. je la 31a de Decembro 1952

		AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Acoroj ..	..	—	—	4	—	—	—	—	4
Alĝerio ..	..	—	1	4	—	—	—	—	5
Andoro ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Angolo ..	..	—	—	7	1	—	—	—	8
Argentino ..	..	250	—	21	2	—	3	—	276
Aŭstralio ..	..	90	5	71	4	1	10	—	181
Aŭstrujo ..	..	—	17	56	8	—	2	2	85
Belgujo ..	..	444	14	141	15	1	5	1	621
Borneo ..	..	—	1	—	—	—	1	—	2
Brazilo ..	..	1638	200	286	73	2	19	1	2219
Britujo ..	..	940	170	616	150	5	78	4	1963
Bulgarujo ..	..	—	—	2	—	—	1	1	4
Cipro ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Ĉeĥoslovakujo ..	..	—	—	31	—	—	3	6	40
Ĉilio ..	..	—	—	2	—	—	—	—	2
Ĉinujo ..	..	—	—	4	—	—	1	—	5
Danlando ..	..	1020	30	124	5	—	1	1	1181
Egiptujo ..	..	—	—	8	—	—	3	—	11
Etiopio ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Finnlando ..	..	—	57	184	—	—	1	1	243
Fr. Ekv. Afriko ..	..	—	—	1	1	—	—	—	2
Francujo ..	..	970	72	335	30	—	15	10	1432
Germanujo ..	..	—	52	239	37	—	8	2	338
Grekujo ..	..	—	—	3	—	—	—	1	4
Gvatemalo ..	..	—	—	3	—	—	—	—	3
Hindujo ..	..	—	2	1	—	—	1	—	4
Hispanujo ..	..	355	17	99	5	—	6	1	483
Hongkongo ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Hungarujo ..	..	—	—	7	—	—	—	3	10
Indonezio ..	..	—	—	2	—	—	—	—	2
Irako ..	..	—	1	—	—	—	—	—	1
Irano ..	..	—	—	—	1	—	2	—	3
Irlando ..	..	—	9	11	1	—	—	—	21
Islando ..	..	—	1	41	1	—	3	—	46
Italujo ..	..	670	35	154	6	—	3	1	869
Izraelo ..	..	—	—	48	1	—	1	—	50
Jamaiko ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Japanujo ..	..	—	16	81	1	—	—	1	99
Jugoslavujo ..	..	663	2	48	—	—	2	1	716
Kanado ..	..	—	4	16	6	—	4	—	30
Kanariaj Insuloj ..	..	—	—	4	1	—	1	—	6
Kenjo ..	..	—	—	—	1	—	1	—	2

		AM	MJ	MA	MS	Pat.	DM	HM	Sumo
Kongo ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Koreujo..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Kubo ..	..	—	—	17	1	—	1	—	19
Kuwait ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Libano ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Luksemburgo	..	—	—	2	—	—	—	—	2
Madagaskaro	..	—	—	3	—	—	—	—	3
Madeiro..	..	—	—	3	—	—	—	—	3
Malajo ..	..	—	—	—	1	—	—	—	1
Maroko ..	..	—	28	29	11	—	4	1	73
Martiniko	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Meksikio	..	—	—	4	—	—	—	—	4
Ned. Antiloj	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Nederlando	..	622	61	324	22	1	6	5	1041
Nigerio ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Norvegujo	..	707	40	101	14	—	5	1	868
Nova Kaledonio	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Nov-Zelando	..	210	18	46	8	—	7	—	289
Peruo ..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Pollando	..	—	—	8	—	—	1	2	11
Portugalujo	..	—	5	48	5	—	4	3	65
Rodezio..	..	—	—	2	—	—	1	—	3
Rumanujo	..	—	—	1	—	—	—	1	2
Sarlando	..	—	1	13	—	—	1	—	15
Sieraleono	..	—	—	—	1	—	—	—	1
Sud-Afriko	..	—	3	23	3	—	1	—	30
Sudano ..	..	—	—	—	1	—	—	—	1
Svedujo..	..	1330	121	279	51	—	15	3	1799
Svislando	..	140	60	83	12	—	29	3	327
Thailand	..	—	—	—	1	—	—	—	1
Trinidado	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Tripolio..	..	—	—	1	—	—	—	—	1
Turkujo..	..	—	—	12	—	—	—	—	12
Ugando ..	..	—	—	—	1	—	—	—	1
Urugvajo	..	—	1	19	4	—	1	—	25
Usono ..	..	398	12	125	39	—	17	2	593
Venezuelo	..	—	—	8	1	—	—	—	9
79 landoj ..		10447	1056	3820	526	10	268	58	16185

Ni havas grandan esperon ke rezultoj en 1953 estos eĉ pli bonaj. La komenco estas tre bona, kiel montras la jena tabelo pri la

Internacia Konkurso 1953

Stato je la 31a de Januaro

Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Danlando ..	2500	2250	90.0
2. Japanujo ..	900	690	76.6
3. Urugvajo ..	250	180	72.0
4. Svislando ..	1450	1035	71.4
5. Portugalujo ..	600	405	67.5
6. Nederlando ..	4600	2965	64.4
7. Maroko ..	600	370	61.7
8. Britujo ..	10000	5923	59.2
9. Kubo ..	250	145	58.0

10. Svedujo ..	5500	3175	57.7
11. Germanujo ..	3200	1790	55.9
12. Usono ..	2300	1240	53.9
13. Sud-Afriko ..	300	160	53.3
14. Norvegujo ..	2100	1115	53.1
15. Hispanujo ..	1500	795	53.0
16. Belgujo ..	2200	1153	52.4
17. Irlando ..	250	125	50.0
18. Francujo ..	5200	2521	48.5
19. Finnlando ..	2200	1060	48.2
20. Kanado ..	300	135	45.0
21. Aŭstralio ..	900	390	43.3
22. Italujo ..	2400	1030	42.9
23. Islando ..	450	120	26.6
24. Jugoslavujo ..	1500	385	25.7
25. Aŭstrujo ..	800	205	25.6
26. Nov-Zelando	900	200	22.2
27. Argentino ..	500	40	8.0
28. Brazilo ..	6500	30	0.5

André Albault :

Kiel vigligi niajn grupojn ?

MALMULTAJ grupoj en nia movado atingis plenan disvolviĝon kaj iĝis veraj kulturcentroj. Ne sen angoro, do, ni povas demandi al ni, kio okazus se supera instanco hodiaŭ, aŭ eĉ post 2-3 jaroj, enkondukus Esperanton ! Certe tio estus signalo por pli malpli ĝenerala atako kontraŭ ni—ĉiam pozicio vekas opizicion. Nur laŭ la grado de la preteco de nia movado en ĉiuj siaj partoj, ni povos facile rezisti kaj sukcese ataki kaj venki. Pro tio ni ĝojas pri la ampleksaj nunaj klopodoj de nia UEA kaj pri ĝia senprecedenta sukceso ĉe UNESKO. Sed ni ne povas kontentiĝi per tiaj sukcesoj. Ĉiu grupo devas plivigligi kaj levi sian nivelon tiel, ke la tuta movado aperu kiel kultura forto je la mezuro de la nunaj necesoj.

Ni estas konvinkitaj, ke nur manko de elprovitaj metodoj kaj de sistema agado ebligis, ke multaj grupoj mizere vegetas. Tial ni kreis centron kiu jam komencis studi la teorion kaj praktikon de nia agado. Tiu centro, "Komisiono por Instrukci-Kurso" (K.I.K.), organizos ĉiujaran instrukci-kurson, kiu proponas montri al bonvolemaj aktivuloj kion oni faru kaj kiel oni agu por pleni disvolvi lokan grupon.

* * *

Efektive la centro de nia studo estas la grupo ; tamen ni atentis la esperantiston kaj la nacian kaj internacian movadojn : la anon kaj la ĝeneralan organizon.

Kiel indikon, legu la ĉefajn trajtojn de nia studplano :

1. La Grupo

(a) *Organizo kaj administrado* : fondo, funkciuloj kaj membroj, agadoj, materiaj oportunaĵoj.

(b) *Informado* : bazaj konoj, celoj, kvalitoj de informanto kaj de informado, fontoj kaj rimedoj, kontrolo de la rezultoj.

(c) *Instruado* : bazaj konoj, "politiko" de la kursoj (la kursanoj vere konvinkiĝu kaj iĝu grupanoj), metodoj.

(d) *Kultura vivo* : diversaj tipoj de kunvenoj, de programeroj, engrupa aktiveco, eksteraj manifestiĝoj, kulturaj interŝanĝoj, niaj programoj.

2. La Esperantisto

3. Nacia kaj Internacia Movadoj.

La unua Instrukci-kurso okazos en la Kulturdomo de Francaj Esperantistoj, 1-8 Sept. 1953, sub gvido de ties sekretario, S-ro E. Bidoit (adreso : Instituteur C.C., SUIPPES (Marne), Francujo), al kiu oni skribu por informo.

La ĉiutaga tempuzo estas alloga por seriozaj aktivuloj ; ne nur paroladoj, diskutoj kaj studoj, kiuj estos la esenco de la kurso, sed ankaŭ distraj vesperoj organizataj de la partoprenantoj mem. Plie promenadoj en ĉarma regiono malstreĉigos la spiritojn.

Bedaŭrinde nur 40 lokoj estas disponeblaj ; nur la unuaj petantoj estos kontentigitaj. Tamen ekzistas projekto ke la dokumentojn pretigitajn povu ricevi ankaŭ eventualaj abonantoj.



38-a Universala Kongreso de Esperanto

25 julion—1 aŭguston, 1953

Poŝtfako 213, Zagreb, Jugoslavujo

Banka konto : Narodna banka, Zagreb, no. 402-T-844

N-ro 4

OFICIALA KOMUNIKO

Februaro 1953

I.S.U. : Akceptis esti Rektoro de la Internacia Somera Universitato en Zagreb Prof. D-ro Josip Badarić, membro de la Jugoslava Akademio de Scienco kaj Artoj. Prof. Badarić esperantistiĝis en 1909. Li estas vaste konata kiel verkisto kaj filologo.

Dua Bulteno : La Dua Bulteno estas presata kaj estos sendata al ĉiu kongresano tuj kiam ĝi estos preta. Ĝi ne estas por ĝenerala disdono, sed nur al tiuj, kiuj aliĝis al la kongreso.

Hoteloj, mendoj : La Zagreba entrepreno "Turist" presigas prospekton kiu estos preta meze de februaro. Ĝi estos havebla de ĉiu petanto. Ĉiu aliĝinto al la kongreso ricevos ĝin sen peto. Ĝi enhavos ĉiujn detalojn pri prezoj, hoteloj, manĝoj kaj ekskursoj. Bonvolu ne skribi al L.K.K. pri mendoj. La adreso de "Turist" estas : Zrinjevac 18, Zagreb.

Peranto : Por Norvegujo peras kotizojn F-ino V. Birkevold, Hjelme-landsgaten 77, Stavanger.

Pagoj : Aliĝontoj al la kongreso nepre pagu kotizojn al la Peranto en sia lando se tio ekzistas, aŭ iamaniere al U.E.A. Se eble evitu ĝiron de kotizmono al Zagreb. Liston de Perantoj oni trovas en la antaŭaj Oficialaj Komunikoj en la esperantista gazetaro.

Fakaj asocioj : Nepre anoncu vin

kiel eble plej baldaŭ. La Provizora Programo devos esti preta antaŭ Pasko por konsidero de U.E.A.

Aliĝo : La tarifo de la dua periodo nun validas. Ne atendu ĝis la fino de marto por profiti tion sed jam nun aliĝu. Tio helpas la administran laboron. La L.K.K. denove atentigas, ke ĝi akceptos aliĝilojn nur ĝis la fino de junio, konforme al la Kongresa Regularo de U.E.A.

Artikolo pri Zagreb : Presita artikolo pri Zagreb estas disponebla por kluboj kaj societoj kiel prelego. Petu ekzempleron de L.K.K. Limigita kvanto.

Antaŭkongreso : La adreso estas : Aŭstria Esperantista Federacio, Sternallee 5, Klagenfurt, Aŭstrujo.

Postkongreso : Informoj de : Organiza Komitato de Postkongreso, Mikloŝiĉeva 7, Ljubljana, Jugoslavujo.

Statistiko : (ĝis fino de jan.) Argentino 1, Aŭstralio 1, Aŭstrujo 31, Belgujo 2, Brazilo 1, Britujo 64, Danlando 24, Finnlando 4, Francujo 86, Germanujo 50, Gvatemalo 1, Hispanujo 1, Italujo 11, Izraelo 1, Jugoslavujo 325, Nederlando 9, Norvegujo 11, Pollando 1, Portugalujo 1, Svedujo 54, Svislando 24, Turkujo 1, Usono 4. Sumo 708 el 23 landoj (lastjare 687).

Mason Stuttard
Konstanta Kongresa Sekretario

Marinko Gjivoje :

Susak—kurioza adriatika sablo-insulo

JUGOSLAVUJO estas la lando de mil insuloj. Inter 413 marrokoj, 558 insuletoj kaj 69 insuloj kuŝantaj laŭlonge de jugoslava Adriatiko, neniuj aliaj insuloj laŭ siaj konsisto, vegetaĵaro kaj apartaj ecoj de la loĝantoj estas kompareblaj kun Susak—malgranda insulo en norda Adriatiko. Simila insulo ne estas trovebla eĉ en la tuta Mediteraneo. Ĝi imponas nek laŭ surface (3.76 kv. km.) nek laŭ alteco (nur 98 m.). Ĝia karakteriza propreco diferenciganta ĝin de la aliaj insuloj konsistas en la tiea sabla strukturo.


Sur la kalkŝtona grundo de la insulo kuŝas dikaj sablaj tavoloj leviĝantaj en la formo de egipta ŝtupara piramido. La borda zono posedas helgrize-nigran koloron devenantan de marherboj. Tiun suban tavolon kovras sabla tavolo dika 90 m., longa 5 km., kaj larĝa 100-500 m. Tian kaj tioman sablan zonon posedas neniuj aliaj adriatikaj insuloj. Tial ke pluvakvo facile trapenetras sablotavolon, la insulo posedas eĉ ne unu akvofonton. La insulanoj konstruas al si akvujojn apud la domoj kaj vinbergardenoj. Kiam regas tro granda senpluveco mankas akvo en la cisternoj kaj oni devas ĝin porti per cistern-ŝipoj el Rijeka kaj Pula.

La apuda insulo Losinj estas riĉa je diversaj kreskaĵoj el 1018 specoj. Sur Susak prosperas kontraŭe nur 208 specoj de kreskaĵo. Do la sabla tereno kaŭzas konsiderinde pli malriĉan vegetaĵon. Tamen Susak posedas plurajn avantaĝojn kiuj igas ĝin kurioza kaj unika. Sur ĝi nun abundas du plantoj: kano kaj vito. La kano estas tre multe uzata. Ĝin

oni renkontas ĉiupaŝe en la formo de malgrandaj arbaretoj kaj palisaroj inter unuopaj terpecoj kulturitaj per vitoj. Sur ĉiuj insuloj kie ŝtonoj abundas, tiuj limmuroj estas ŝtonaj. Iam ĝis antaŭ kvindek jaroj oni uzis kanojn eĉ en la domkonstruado. Krome oni uzas kanojn kiel palisetojn por subteni vitojn, kiel palisetojn kiuj ŝirmas kontraŭ la vento kaj kiel brulaĵon.

Neniuj aliaj insuloj posedas tioman areon kulturitan per vitoj (vinberujoj) kioman Susak. Pri tio certigas la jena cifero: la areo kovrita per vitoj estas 327 ha. kiu egalas 87.5%. Do vinberkulturo estas la ĉefa agrikultura branĉo kaj la ĉefa okupo de la loĝantoj. La nombro de loĝantoj, laŭ la statistiko farita en 1948 estas 1619 personoj, kio estas 425 homoj sur ĉiu kvadrata km. La nombro de vitoj estas 1.600.000, inter kiuj estas troveblaj eĉ 150-jaraj plantoj, kiuj donas 15.000-18.000 hektolitrojn da vino ĉiujare. La vitoj kelkloke similas al arboj sub kiuj oni povas rekte pasi. La riĉeco de individuaj familioj estas kalkulata laŭ la nombro da vitoj kiujn ili posedas.

Ankaŭ legomoj prosperas sur la insulo sed strange estas ke tie ne ekzistas la karakterizaj mediteraneaj oliv-arboj kaj arbustoj. Fruktarboj ne abundas. Ankaŭ vane oni tie serĉas tiun longorelan ŝargbeston, la azenon. La sablo influis ankaŭ la domkonstruadon. Ne havante ŝtonon—kaj porti ĝin de malproksime estus multekoste—la Susakanoj elpensis konstrumanieron, kiu ekzistas nenie aliloke sur la jugoslava

*Susak-haveno**Foto : Foto-sluzba Hrvatske*

marbordo. Aldonante kalkon al la sablo ili produktas specialan morteron, similan al cemento, kiu post sekigo fariĝas tre malmola.

La insulo interesas el antropologia vidpunkto. Nenie sur la adriatika bordo oni trovas tian tipon, kian ĉi tie. La Susakanoj havas mallarĝan, longan dolikocefalan kranion. Ankaŭ la dialekto estas aparta, nomita *ĉakava* (pro tio ke oni elparolas *ĉa* anstataŭ *ŝto*=kio). La etnografiaj elementoj diferencigas la homojn de la insulo de aliaj insulanoj. Nenie aliloke la virina vesto similas tiun de Susak. La vilaĝaninoj tre riĉe sin vestas. Ĉe la supra korpoparto oni portas veŝton kaj ĉirkaŭ la kolo koltuketon. Surkape oni portas kaptukon. Da jupej, etendiĝantaj de la talio ĝis la genuoj, ili ne uzas multe

dum la labortagoj sed okaze de festo ili surmetas kvin tiajn jupejn kaj ĉiu aparta jupe konsistas el 7 metroj da ŝtofo. Okaze de edziĝfestoj la fianĉino surmetas 7–8 tiajn sub- kaj sur-jupejn. Ĉiu jupe estas blanka kun escepto de la unua ekstera, kiu kutime estas blua.

Post la vinberrikolto—pri kiu okupiĝas precipe la virinoj—la fiŝkaptado estas la dua ĉefa okupo de la insulanoj kaj pri ĝi okupiĝas la viroj. Pro fruktomanko oni trovas tre malmultajn birdojn tie kaj sekve pri birdkaptado ili ne okupas sin. Tamen birdoj estas kapteblaj sen ia ajn klopodo. En la jaro 1888 sur la supro de la insulo oni konstruis lumturon. La lumo dumnokte allogas birdojn el malproksimo. Ili alflugas

Fino sur paĝo 112

Nia Forumo

PAROLAS LA LEGANTOJ

Korespondantoj nepre esprimu sin koncize kaj mallonge. Antaŭ ol sendi leteron por publikigo kontrolu la longon per komparo kun jam presita teksto.

Presigo de letero de korespondanto ne necese signifas ke U.E.A. oficiale subtenas la esprimatajn opiniojn.



Gratulo

Permesu al mi esprimi mian grandan ĝojon kaj miajn varmajn gratulojn en kontakto al la decido de UNESKO pri Esperanto, kiu supozeble gvidas nian aferon al tre dezirinda direkto. Kun granda admiro ŝuldas ĉiu esperantisto al ĉiuj, kies giganta laboro kaj celkonscia talento maturigis kaj maturigas tiun ĉi rezulton. Laŭ la unua raporto laŭnome mi povas direkti tiun ĉi admiron al tiuj tri samideanoj, kies rolo estis tute publika, t.e. al nia prezidanto, al s-ro Durrant kaj al prof. Lapenna. Estas klare, ke la energio kaj inteligento de s-ro Malmgren, la celkonscia persisto de s-ro Durrant kaj la brila argumenta kapablo de s-ro Lapenna en si mem signifis grandiozan kunlaboron, sed—ĝis la plej proksima numero de *Esperanto*—nur supozante la aliajn nomojn, mi volas varme danki ankaŭ ĉiujn kunlaborantojn en la centro de UEA kaj en la diversaj landoj.

D-ro F. Szilágyi, akademiano.

Pri varbado de membroj

Dankon pro viaj esprimoj pri mia agado en la varbado de novaj membroj por UEA. Vi demandas al mi pri la maniero laŭ kiu mi atingis tian sukceson.

Vere mi ne scias, kiel respondi tian demandon, ĉar la agado kiun mi plenumas dum ĉiuj tagoj de la jaro,


kvazaŭas tiun “guton konstantan frapantan”. La brazilano, kie ajn li loĝas, amas la spiritajn kaj idealajn aferojn, kia Esperantismo. Mi faris peton al la ĉi tieaj eminentuloj, ke ili helpu la Esperanto-movadon, kaj ili ne fuĝis! Ĉiam, kiam mi havis okazon, mi klarigis al ili pri kio estas Esperanto, pri la movado, pri la celoj de Esperantismo, pri la batalo por unu helplingvo. Ĉiuj ĉiam kunsentas kun mi, kaj mi profitas la okazon por inviti ilin helpi praktike la movadon.

*Wilson Veado,
Coracao de Jesús, Brazilo.*

Pri reaniĝoj

Miaopinie, anstataŭ esperi la reaniĝojn, ĉiu Esperanto - Societo devus havi samideanon zorgantan pri la enspezado de kotizoj. Ne sufiĉas ke oni stimulu la kotizpagon, kiel vi tre trafe faras sur nia revuo *Esperanto*. Malfavoraj ekonomiaj kondiĉoj regas en multaj landoj kaj kelkaj samideanoj ne estas tiel sindonaj kiel ili devus esti. Mi supozas ke se oni enspezus la kotizojn hejme, grupoj, landaj asocioj kaj UEA enspezus multe pli ol ĝis nun. La enspezistoj devus esti fervoraj samideanoj, kaj ties agado aŭ postenoj devus esti konsiderata kiel granda honoro, ĉar tio estus unu el la plej firmaj bazoj de la progreso de la movado.

*Rafael Gisbert,
Barcelona, Hispanujo.*



Centro de Esploro kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

Enketo pri Lernado de Esperanto Inter la Legantoj de Nia Revuo

POR grava celo CED devas esplori laŭ kiu maniero la Esperantistoj ĝenerale ellernas Esperanton. Post konsultiĝo kun kelkaj kunlaborantoj de CED, ni trovis ke estus plej oportune entrepreni enketon inter la legantoj de la revuo *Esperanto*.

Tial ĉiuj legantoj de nia revuo estas petataj respondi al la subaj demandoj, sed antaŭ ol respondi, ili bonvolu legi la instrukciojn kiel respondi. La demandoj estas :

- (1) Lando..... ;
- (2) Sekso..... ;
- (3) Kiom da jaroj vi havis kiam vi ellernis Esperanton ;
- (4) Kiun instruitecon vi havis kiam vi ellernis Esperanton ;
- (5) Ĉu vi ellernis Esperanton
 - (a) kiel gepatran aŭ familian lingvon ;
 - (b) en kurso, organizita de iu Esperanta societo, grupo, asocio aŭ alia organizaĵo ;
 - (c) en ŝtata, provinca aŭ urba lernejo ;
 - (d) kiel memlernanto el lerno-libro ;
- (6) Subskribo

Kiel respondi ?

- (1) Metu la nunan nomon de la ŝtato, en kiu vi naskiĝis.
- (2) Respondu per "viro" aŭ "virino" eĉ se temas pri infano. Por la

infanoj respondu la gepatroj sur aparta papero.

- (3) Por la bezonoj de tiu ĉi enketo "ellerni" signifas tian gradon de lingvoscio, kiu ebligas interkompreniĝon sen malfacilaĵoj.
- (4) Respondu nur per "elementa", aŭ "nekompleta mezgrada", aŭ "mezgrada", aŭ "universitata". Atentu la punkton 3.
- (5) Se vi ellernis (vidu la punkton 3) la lingvon laŭ pluraj vojoj (ekzemple en familio, en kurso kaj kiel memlernanto). menciui *nur tiun*, kiu, laŭ via opinio, estis *decida* por atingo de la lingvoscio postulata sub 3.
- (6) Se pro iu ajn kaŭzo vi ne deziras subskribi, vi ne subskribu. La ĉefa afero estas, ke la respondoj estu absolute veraj.

La enketo ne estas limigita nur al la legantoj de *Esperanto*. Ankaŭ aliaj povas kontribui. Oni povas respondi per simpla poŝtkarto. Ju pli da respondoj alvenos, des pli korekta estos la rezulto de la enketo. Tial ni esperas, ke absolute ĉiuj respondoj : de la Prezidanto de la Akademio ĝis la infano, kiu ĵus ellernis Esperanton kiel familian lingvon.

Ĉiujn respondojn oni bonvolu sendi al adreso de la kunlaborantino de CED : F-ino S. V. Reed, 200 Nevells Road, Letchworth, Herts., Anglujo.

Pri la rezultoj de la enketo mi informos en unu el la sekvantaj numeroj.

Esperanto Eldonaĵoj en 1952

En la julia-aŭgusta numero de *Esperanto* de la jaro 1952 ni publikigis resumon de la Bibliografio, kiun ellaboris la kunlaboranto de CED W. Auld, pri la Esperanto-eldonaĵoj, publikigitaj inter la jaro 1945 kaj Marto 1952.

Nun S-ro Auld ĵus finis la Bibliografion por la jaro 1952. Jen mallonga resumo :

1 biografio, 1 diversaĵoj, 1 dramo, 5 Esperanto-Movado, 7 fikcio, 5 kantoj, 2 legolibroj, 11 lernolibroj, 1 lingvistiko, 6 poezio, 7 nacilingva informado, 2 religio, filozofio, etiko kaj psikologio, 5 sciencoj, 3 sociologio kaj politiko, 21 turismaj kaj aliaj prospektoj, 5 vortaroj.

Sinjoro Auld daŭrigas tiun gravan laboron kaj ĉiujare la listo estos kompletigita. Krome, li nun intense laboras la Bibliografion por la periodo inter 1929 kaj 1945. Kiam li finos tiun laboron, ni posedos, kune kun la Bibliografio de Stojan, kompletan Bibliografion de la Internacia Lingvo.

Imitinda ekzemplo

Antaŭ nelonge CED ricevis de S-ro Frank B. Hotchkin, la sekretario de Elleston Esperanto-Junulara Klubo mallongan letereton, en kiu estis dirite : “Mi priskribis al la anoj de nia Klubo la laboron kaj sukceson de CED en Parizo. Ili treege interesiĝis pri ĝi kaj ili decidis sendi 10 ŝilingojn por helpi al la Centro de Esploro kaj Dokumentado”.

Temas pri klubeto de infanoj 11-15 jaraj en la Elleston County Secondary School. Tiuj infanoj kolektis la sumeton el sia modesta poŝmono, ricevita de la gepatroj por malgrandaj amuzoj. Ne gravas la alteco de tiu ĉi nobla donaceto. Gravas la bela penso kaj la konscio de tiuj infanoj.

Dankesprimo

Okaze de la sukceso ĉe UNESKO la Centro kaj la 2 reprezentantoj de UEA ricevis pli ol 200 leterojn kaj poŝtkartojn kun gratuloj el ĉiuj partoj de la mondo. Inter la aliaj, gratulis sinjoroj Malmgren, D-ro Kempeneers, Generalo Bastien, Prof. Privat, Goldsmith, Kennedy, Jakob, Butler, D-ro Bormann, D-ro Halbedl, Rossetti, Auld, Novzelanda Esperanto-Asocio.

Ne povante al ĉiuj individue respondi, la Centro esprimas laŭ tiu ĉi vojo al ĉiuj sian tre koran dankon. Ĝi esperas, ke tiu ĉi sukceso instigos ĉiujn laborantojn por la afero de la Internacia Lingvo intensigi siajn klopodojn. Tio devos kaŭzi novan disvastiĝon de Esperanto kaj fortiĝon de la Movado en ĉiuj landoj, kiel jam okazas en Finnlando, pri kiu nia kunlaboranto s-ro Vilho Setälä interalie raportas : “ . . . kaj unu sukceso sekvigas alian. Jam en nia lando ni povas antaŭvidi bonegan progreson, se nur niaj fortoj sufiĉos por elkapti la situacion.”

Donacoj al CED

	£	ŝ.	p.
Stato la 7-an de Januaro 1953	68	8	6
Francis W. Shaw, Britujo ..	1	0	0
Elleston Esperanto—Junulara Klubo		10	0
CDEL-libroservo, Danujo ..	1	0	0
J. W. Chambers, Britujo ..	1	0	0
F-ino C. Waller, Britujo ..		10	0
S-ino L. E. Blacklock, Britujo		10	0
S-ino R. Seddon, Britujo ..		10	0
J. D. Applebaum, Britujo ..	2	2	0
Itala Esperanto-Federacio ..	5	0	0
Stato la 7-a de Februaro 1953	£80	10	6

La donacojn por CED oni povas sendi al UEA en Heronsgate, Rickmansworth (Herts.) aŭ al Unuiĝo Esperantista Franca, 34, Rue de Chabrol, Paris X, aŭ al la Centro mem.

Hans Jakob :

Ferdinand Hodler

1853 — 14 marto — 1953



JE la 14a de marto 1853 naskiĝis en eta vilaĝo de la Berna Oberland, Gurzelen, knabo kiu devis fariĝi kreinto de nova formo en pentro-arto kaj pro aro da eksterordinaraj verkoj *la* svisa pentristo. Filo de malriĉaj gepatroj, daŭre batalantaj kontraŭ mizero, Ferdinand Hodler jam frue montris talenton por la pentrado. La malesto de materiaj rimedoj ne permesis, ke li povu sin dediĉi al la arto, kiu laŭ diraĵo de Gottfried Keller ne havas favoran grundon en Svislando. Deksepjara li pentris laŭserie sur lignaĵoj pejzaĝojn svisajn vendatajn por kelkaj frankoj al turistoj. Lin tedis nature tia metio kaj li decidis iri sian propran vojon. Tiutempe aro da pentristoj verkis en Ĝenevo kaj Hodler iris piede de Berno al Ĝenevo. Li ne havis monon, nek helpon, sed kuraĝon kaj fidon. Laborante pri ĉio, pentrante afiŝojn, bonŝanco direktis iujn bonvolulojn, inter ili pentristo Barthélemy Menn, je tiu ĉi deknaŭjara junulo, serĉanta la arton. Ili ebligis al li viziti lernejon de belartoj. Lia persisto kaj obstino, karakterizaj trajtoj liaj, kompensis la mankon de formala edukado. En jaro 1874 li jam ricevis premion por bildo.

Lia arto, tiom kontraŭa al la ĝis tiam kutima, vekis kritikadon kaj rifuzon de bildo por ekspozicio. Denove bonŝanco lin helpis, meceno ebligis al li unujaran restadon en

Hispanujo, kie li energie studis kaj formis sian propran stilon.

Li revenis

Ĝenevon kie li restis ĝis vivo-fino. Vivo ne estis facila por li, lia stilo ne nur vekis ordinaran kritikon sed opozicion akran, ja eĉ malamikan. Lia laborejo en Ĝenevo, en la centro de la malnova urbo en sesa etaĝo, estis pli ol simpla. En jaro 1900, li ricevis registaran mendon por la muzeo en Zürich. La Artkomisiono rifuzis la projekton prezentitan. Sed la registaro komprenis, ke temas pri io tute nova, io absolute malkonvencia kaj protektis la pentriston kontraŭ la komisiono kaj la centoj de gazet-artikoloj kontraŭ la “fuŝprojekto”. La bildo montris epizodon en la batalo de Marignano en jaro 1515, la lasta paĝo de la milita ekspansio svisa kaj la ĝermo de la konstanta neŭtraleco politika de la svisa konfederacio. Oni devas kompreni tiun ĉi epizodon laŭ tiu ĉi sekvo. La maniero lerneja priskribi tiajn historiajn eventojn tendencas ĉiam lokigi la agantajn homojn sur alta piedestalo kaj krei el ili iajn “super-homojn”. Jen venas Hodler kaj montras ĉi tiujn “heroojn” kiel ili certe estis, ne alie ol Johano aŭ Petro de nia tempo. Tiu ĉi pentraĵo estis la decida punkto en la vivo de Ferdinand Hodler. Venis aro da

mendoj precipe el eksterlando, ekzemple la “Ĝiĝo de la studentoj 1813”, (Jena) kaj la Reformacia bildo en Hannover.

La arto de Hodler fariĝis vojmontranta por la ekspresionismo. De tiam la pozicio de Hodler en pentro-arto estis fiksita kaj ne plu sanĝebla. Dotita de eksterordinara laborkapablo kaj povo, liaj bildoj kaj skizoj, pejzaĝoj, figuroj simbolismaj, portretoj, kalkulis je kelkaj miloj. Honoroj kaj titoloj ne mankis. Tiu ĉi vivo plena je laboro, je lukto pro rekono kaj kronita fine per venko, estingiĝis la 19an de majo 1918. Tuta Svislando komprenis ke unu el siaj plej distingaj filoj foriris por ĉiam.

Personaj memoraĵoj

Dekokjara junulo, mi estis invitita en Heidelberg ĉe fama profesoro, iama rektoro de la Universitato. En luksa salono mi vidis pejzaĝon kaj longe rigardis ĝin. La filino de la profesoro demandis min: “Ĉu vi konas pentriston Hodler, ĉar vi tiom atente observas tiun ĉi bildon?” “Mi korespondas kun lia filo kiu estas Esperantisto”. “Jes, vi ja estas Esperantisto, sed mi ne sciis ke la filo de tiu ĉi grandioza pentristo sin okupas pri Esperanto, via dorlotinfano”.

Du jarojn poste mi konatiĝis kun Ferdinand Hodler en la Centra Oficejo de UEA, en Rue de la Bourse, la Borsa Strato kiel ni ĝin nomis. Fortika, mezgranda viro kun penetranta rigardo de observanta pentristo, profunda voĉo decida. Ofte li venis al la tiama Centro de UEA kaj povis konstati sian propran karakterizaĵon ĉe lia filo Hektor: obstineco kaj persisteco. Certe Hodler ne rigardis favore je la manio

de la filo. Sed la serioza laborado, la firma volo krei ion impresis lin kaj li komencis eĉ admiri tion.

La tiama Centra Oficejo (tuta etaĝo!) aspektis tre solene pro diversaj pentraĵoj de Hodler troviĝantaj en la laborejo de la filo kaj en la granda salono, kiu servis kiel akceptejo. Preskaŭ tridek jarojn post la morto de Hodler mi renkontis lian nomon ankoraŭfoje: laborinte en la Ŝtata Arkivejo Ĝeneva mi trovis enskribon en grandega libro de la Kontrolo de loĝantoj: estis la alveno de la juna pentristo en la urbo tiom kara al li. Tiu ĉi enskribo kontrola estis ruĝe trastrekita kun jena mencio (franc-lingva):

Honora burĝo, laŭ decido de la Ŝtata Konsilantaro Ĝeneva.

Honora civitaneco de la urbo kaj strato kun lia nomo, jen la eksteraj signoj kiujn konsentis la Respubliko al li.

Tia estis Ferdinand Hodler, la patro de la animo de UEA, Hektor. Du homoj absolute malsimilaj ekstere, sed tre similaj en unu rilato: firma volo kaj senhezita obstino. H. Hodler havis la kvaliton de gvidanto kaj dediĉinte siajn kapablojn al publikaj aferoj li estus atinginta saman famon kiel la patro. Homo ne tre parolema li sciis estri, ne rimarkite de tiuj lin ĉirkaŭantaj. Neniam mi forgesas la momenton, kiam ni post starigo de la impona helpservo dum la unua milito, ricevis unuajn dankleterojn pro faritaj servoj. Kun brilanta okulo, H. Hodler montris al mi unu el tiuj elokventaj skribaĵoj, dirante: “Neniam ni estis tiom utilaj kiel nun!”

Memorante la patron oni ne forgesu la filon, ambaŭ grandaj en iliaj faroj.

Fritz Schwarz :

Topografia kaj historia unikaĵo

TIO vere estas la ĉarma urbo Thun en Svislando kaj la Kastelmonto en ĝi, kies sudflanka vidaĵo ornamas la kovrilpaĝon de ĉi tiu numero.

Kiam, instigita de la grandiozeco de la naturo, montriĝis inklino pentri grandegformatajn panoramojn, la meritplena svisa pentristo Marquard Wocher, loĝinta en Basel, sin dediĉis ankaŭ al tiu nova furoro kaj serĉis motivon. Tiucele li trovis plej inda la idilian svisan urbeton Thun, kies naturbelecaj kvalitoj fakte estas eksterordinaraj. Post proksimume dekjara sinofera laboro, Marquard Wocher vidis efektivigita sian kuraĝan entreprenon kaj ek de la jaro 1816 la "Panoramo de Thun", vide de la unika Kastelmonto, estis ekspoziciita publike en Basel. La grando de la bildego estas 37.70 m. longa kaj 7.40 m. alta.

La ekspoziciinto tiutempe efike reklamis favore al la motivdona urbeto, eĉ inter imperiestroj el malproksimaj landoj. Post forpaso de la kreinto, tiu pentraĵo malrekte fariĝis propraĵo de sociema institucio de la urbo Thun. Bedaŭrinde, ke ĝis nun ne solviĝis la problemo de ĝia ekspoziciado ĉi-loke. La pentrita juvelo enkeste dormadas pli ol duonan jarcenton, kaj kiam malkovrita ĝi pruvos kiom dume la urbo plikomfortiĝis. La moderna trafiko bedaŭrinde forevoluigis ankaŭ kelkajn el la historie valoraj pordegoturoj ĉe la stratfinoj rande de la murĉirkaŭita urbeto. Ne plu vice sidas la pentristoj dum la tuta tago antaŭ la romantika

atestaĵo el antaŭaj epokoj; oni fotografas nun tiajn vidindaĵojn aŭ kolorfilmas ilin.

Faktas, do, ke ekzemple la thunanoj perfilme konatiĝis kun la indiĝenoj en la aŭstraliaj malpli civilizitaj regionoj kaj la aŭstralianoj vidmaniere estos atentigitaj pri la majesteco de Thun kaj ĝia ĉirkaŭaĵo. Tian interkontinentan ligitiĝon ni multe dankas al Esperanto kaj al la interhelpa servo de la Delegitoj de UEA. Bona ekzemplo ja estas la traeŭropa studvojaĝo de samideano Frank Halls el Melbourne, kiu ankaŭ en Thun praktikis kulturecan interŝanĝon. En septembro 1952 li funkciigis sian filmaparaton samloke kie Marquard Wocher antaŭ proksimume 150 jaroj penike amikiĝis kun Thun, t.e. sur la Kastelmonto.

Ni imagu, kiel mistere la kastelmonta silueto gigantas en la nokta ĉielo, precipe somere, kiam la preĝejo kaj la kastelo, la ekkoniloj de la urbo, estas lume radiigitaj. Tiu roka altaĵo iam leviĝis el la dezerta praepoka glaciaro kaj dekomence ludis gravan rolon. Laŭ malnova tipografio pri Thun, en la sesa aŭ sepa jarcento p.K. katastrofa terŝoviĝo veninta de la proksima Grusisberg grave alilokigis la fluejojn de la rivero Aare; dume la rokaĵo malhelpis pereigan superŝuton de la urbeto. La Kastelmonto, tiel nomata depost la konstruado de la impona kvartura kastelo el la 12a jarcento, nuntempe estas valora rezervaĵo de la thuna historio. Ne tuŝita de la vigla trafiko, unu sola voĵo laŭiras la montdorson,

kion iom pli sube paralelas intermura vojeto iam uzita de ekleziaj procesiintoj.

Ĉi tie fakte ĉiu konstruaĵo, ĉiu materia estaĵo, reprezentas historian dokumenton. La kastelo, kvazaŭ konstruita por la eterno, apenaŭ du jarcentojn gastigis dukajn kaj grafajn suverenojn. Interfrata rivaleco, kiu finis nur post terura mortigo, rapidigis la disfalon de la lastreginta gento. Poste la kastelo fariĝis grenejo aŭ restis neuzata, kelktempe oni tie enkarcerigis friponojn kaj krimulojn, kaj nuntempe tre vizitinda historia muzeo enestas. Kiu iam bonŝancas viziti la urbon Thun kaj esti kelktempa aŭ prefere tuttaga "Kastelmontano" prave sin sentas privilegiulo.

Memore al nia neforgesebla Esperanto-pioniro kaj fondinto de UEA Hektor Hodler, ni menciuj, ke lia patro, la eminenta svisa pentristo Ferdinand Hodler, en butikoj piede de la thuna Kastelmonto kiel lernbubo ĉe flagpentristo tiom malsukcesis, ke li, ege timigita, forkuris poste—en la profesian famon.

Pri la urbo Thun ekzistas bele ilustrita faldprospekto esperantlingva, kiun sendos senkoste al vojaĝemaj petontoj la UEA Delegito Fritz Schwarz, Wiesenstrasse 1, Thun (Svislando).

La Biblioteko de UEA

Palais Wilson, Genève, Svislando
deziras akiri ekzempleron de la verko
de A. L. Guérard :

A Short History of the International Language Movement

aperinta ĉe
T. Fisher Unwin, Ltd., London.
Proponojn danke akceptos
Hans Jakob, Estrarano de UEA.

Belarta Konkurso

Ni anoncas novan branĉon por ĉeestantoj de la Universala Kongreso en Zagreb, nome **branĉon de Deklamado**.

Por deklamo validas tekstoj (kompletaj verkoj aŭ ĉerpoj) de poezio kaj prozo, inkluzive dramon. Deklama peco daŭru ne pli ol dek minutojn.

La partoprenantoj sin anoncas ĉe la kongreso mem, kaj deklamas unue antaŭ la juĝa komisiono en speciala kunsido. La elektitoj prezentas siajn deklamaĵojn en la kunsido de la Belarta Konkurso. La findecido pri merito okazas dum tiu publika prezentado, kaj la plej bonaj deklamintoj ricevas premion.

Belarta konkurso, literatura sekcio.
La juĝa komisiono por la supra sekcio konsistas el jenaj personoj :—

Akademianoj S-ro S. La Colla, D-ro F. Szilágyi, Prof. G. Waringhien. S-roj R. Bernard, E. A. Haugen, R. Rossetti.

Ĉar partopreno okazas sub pseŭdonimo, konkursantoj devas ne konigi private sian konkursan verkon al iu el la juĝantoj.

Memornoto

Limdatoj por alveno de la konkursaĵoj estas :—

Por la originala dramo, la 30a de aprilo 1953.

Por la poezio (originala kaj traduka) kaj la prozo (originala), la 31a de majo.

Por la branĉo de afiŝo kaj ilustro, la 15a de junio.

Plenaj detaloj en *Esperanto*, Novembro kaj Decembro 1952, aŭ skribu por informo al la Peranto, S-ro K. Lawrence, 244 Quinton Road, Birmingham 17, Anglujo.

R. Rossetti, Sekretario.

Juliano Tuwin :

Pri estetika aprezo de lingvoj

JULIANO TUWIM, nun pli ol 60-jara, estas unu el la plej grandaj, se ne la plej granda, el vivantaj polaj poetoj. Profunda amo al la patrujo donis al li emocian komprenon de la poezio. Lia juda deveno donis al li kritikan kaj satiran sindefende atakan sintenon al la socio kaj homoj. Ĵaluze sendependa, rapide reaganta je ĉiuj vivofaktoj, li fariĝis senkompata skurĝo de ĉiaj malpravaĵoj, maljustaĵoj, pompo, hipokriteco, bruteco. Kvankam li estas timata potenculo de sarkasmo, lia signifo tamen troviĝas en pozitivaj regionoj de poezia kreado. La esenco de lia krea kredo estas kunhomeco—ofte esprimata per ironio, kvazaŭ sindefende kontraŭ sentimento, kvazaŭ rifuzante malkaŝon de sia memo. Ofte la sento de kunhomeco aperas en groteska, brute realisma imago. Sed lia vera vivtasko, la ĉefa temo de lia poezia kreado estas poezio kaj poetoj mem. Li kantas poezion kaj voĉigas poeton—en lia protesto kontraŭ socio, en lia kunsonoro kun homeco, en lia ĝuo de naturo—ne de naturo mem, sed de ties poezia esprimeblo. Li estas pasia amanto de poezia arto. Li kreis novan lingvon poezian, instruis al tuta generacio de poetoj aprezon de parolaj valoroj. Supera majstro de lingvo, konscia pri sia estreco kaj povo—ĝis limoj de lingva ĵonglado—li ĝuas kaj ĝuigas al siaj legantoj personan kaj celan lingvokreadon, komprenon de estetika valoro de parolo kaj vorto. Kvankam ne profesia lingvisto, li fervore studas, sekcas, analizas kaj poezie ree sintezigas la lingvon en ĉiuj ties aperaĵoj.

La emo al ĝisfunda kompara ekkono, al intelekta ekregio de la faktoj de lingvo jam en lia junaĝo, dum li ankoraŭ estis gimnazia lernanto en sia naskurbo Lodz, gvidis lin en 1910 al Esperanto. En Esperanto ankaŭ aperis liaj unuaj poeziaj provoĵ—tradukoj el polaj poetoj publikigitaj en la *Pola Esperantisto*. Jam en tiuj junulaj provoĵ vidiĝas lia kompreno de poezio kaj majstreco de lingvo. Lia Esperanta verkado reflektas influon de Antonio Grabowski kaj certe egalas kulminajn atingojn de la Varsovia literatura skolo Esperanta. Nur malmultaj el liaj poemoj estas Esperantigitaj, kaj plejparte ili estas dissemitaj tra ĵurnaloj kaj gazetaj malfacile akireblaj.

Okupite pri sia poezio kaj pri la nefacila tasko de perpluma vivgajno, Tuwim ĉesis partopreni la movadon, sed neniam perdis kontaktojn kun Esperanto. Nun—okaze de sia lasta verko—li denove aktive ekinteresiĝis pri Esperanta movado kaj pri historio de interlingva problemo. Ĝis nun li deklaras sin Esperantisto. La ĵus menciita libro, la *Baŭmanta Pegaso* (Varsovio 1950) estas laŭ sia plena titolo *Poezia panoptikumo en kiu estas rigardeblaj eksterordinaraj eksponaĵoj kaj specimenoj, malofteĝaj strangaĵoj kaj mirindaĵoj, rimmonstroj kaj versaĵoj, poeziaj salto mortale, supera rajdskolo sur la Pegaso, admirindaĵoj, mirakloj, dusencaĵoj kaj ekscentraĵoj . . . lingvistaj fantasmagorioj . . . grafomanaj ellaboraĵoj . . . akrostikoj, taŭtogramoj, lipogramoj . . . kaj centoj da aliaj parnasaj ĝuindaĵoj el malnovaj kaj maloftaj paperaĉoj senbezzone*

eltombigitaj kaj presigitaj. Kiel spertulo pri poezio, Tuwim estas ankaŭ pasia kolektinto de ĉiaj literaturaj kaj lingvaj strangaĵoj kaj fenomenoj kaj kun gastronomo ĝuo li elektis la plej bonan materialon por sia stranga libro. Ĉi tiu monumento de vasta eruditeco ampleksanta ĉiujn epokojn de literatura kreado—de Sanskrito ĝis moderna futurismo—estas rezulto de multjara sperto kaj kolektado. Dum la milito la manuskripto estis kaŝita kaj nur post kvin jaroj ĝi estis retrovita kaj elfosita—unu el malmultaj savitaj verkoj de Tuwin. Malgraŭ sia humora titolo kaj ne malpli humora pritrakto de la temo, la libro enhavas multajn valoregajn observojn pri la lingvoarto kaj malsekretigas interesajn aspektojn de poezia kreado.

Por Esperanta leganto ni elektis fragmenton el la ĉapitro pri “Imito de fremdaj lingvoj”—fragmenton, kiu estas speciale interesa por ĉiu Esperantisto.

La traduko estas farita kun speciala permeso de la aŭtoro.

La tradukinto.

* * *

Imito de Fremdaj Lingvoj

Iu junulo, laŭprofesie absolute radikala patrioto kaj tutnacie diktatora kaj triumfa malklerulo (li agnoskis nur la “mistikajn sugestojn de intuicio”, bedaŭrinde tamen tiu mistera sinjorino nenion volis sugesti al li)—do tiu junulo iam penis konvinki min, ke la lingvo internacia Esperanto similas t.n. “ĵargonon”, t.e. judan lingvon.* Mia interparolanto superis min en la diskuto, ĉar ne konante Esperanton, li povis babili

* Juda lingvo (ne hebrea !)—la “jidiŝ”, lingvo parolita de Judoj en orienta Eŭropo kaj evoluiĝinta surbaze de mezepoka germana dialekto.

kion ajn lia abunda salivo metadis sur lian balbutan langon, dum mia konateco kun Esperanto datas de la jaro 1910. Aŭskultante sugestojn de sia silenta intuicio, la stultulo komprenis nenion pri kio oni parolis al li kaj per malestima rideto bagateligante ĉiujn objektivajn argumentojn, ĉiam denove ripetadis, ke la Zamenhofa lingvo “konsistas nur el iuj hoj, soj, moj, ŝmoj, kaj estas pura judaĵo”. Evidente, li aŭdis iam, ke la pluralo de deklinaĵoj vortoj estas formata pere de la finaĵo “-j”—kaj de tio lia sankta konvinko pri la sonoj “hoj-ŝmoj”, kiuj laŭdire estas esence karakterizaj por juda lingvo.

Anstataŭe, li ĝisĉielen laŭdadis la “sunbrilan lingvon de antikvaj Helenoj”, klarigante al mi, ke la sonoj de ĉiu lingvo reflektas (laŭvorte) la “estetikan valoron de la raso”.

—Pardonu—mi diris al li—mi citos al vi fragmenton de Esperanta poemo kaj vi konstatos mem, ke ĝi ne estas tiel malbona.

Kaj mi recitis :

Palajsmath'hemon ho bios
eŭtiĥusi de
Hoj men taĥ'hoj d'esauthis
hoj d'ede broton . . . †

Mia intuiciulo triumfis :

—Nu, ĉu mi ne pravas ? Hoj-hoj-moj ! Kaj ankoraŭ ĥojside ! Certe io pri ĥasidoj ! ‡ Oni aŭdas tion sur la strato Nalevki ! §

† Eŭripido—La Petegantinoj, versoj 550–551, Vortoj de Tezeo : “La vivo estas kvazaŭ lukto. Hodiaŭ unu superas, kaj morgaŭ iu alia”.

‡ Ĥasidoj—mistika juda sekto, sinonimo por kultura malprogresemo.

§ Nalevki—unu el la ĉefaj stratoj en la antaŭmilita juda kvartalo de Varsovio ; komplete neniigita de Germanoj dum la insurekcio en Varsovia *gheto* en j. 1943

Tiam mi metis lin sur mian maldekstranmanplaton, perfingreklaketis lian nazeton kaj ĉiris :

—Ne, bubeto. Vi ne aŭdos tion sur la strato Nalevki. Tiuj sonoj aŭdiĝadis sur la atena agoro. ¶ Ĝi estas Eŭripido !

La konkludo estas simpla kaj banala : “ne tio belas, kio estas belaĵo, sed kio plaĉas al iu”, alivorte, ke *de gustibus non est disputandum* (oni ne devas disputi pri gustoj), k.t.p. Oni ne povas apliki objektivajn kriteriojn al lingvoj “belaj” kaj “malbelaj” (samkiel al lingvoj “facilaj” kaj “malfacilaj”). Aprezo de estetikaj valoroj de iu lingvo dependas de emocia tendenco, sento, eĉ antaŭjuĝo—kaj ies propra, gepatra lingvo estas konsiderata iagrade kiel la “idealo”. La homaro parolas pli ol du mil lingvojn kaj ĉiu nacio, tribaro aŭ tribo opinias pro emociaj motivoj, ke ĝuste ĝia esprimmaniero estas plej bela—kaj plej simpla. Tute nature : la lingvo en kiu mi pensas, kiun mi parolas senpripense, devas esti pli bona ol la aliaj. Lingvisto Schuchhardt, tenante glason enmane, demandis italan vilaĝanon, ĉu li scias kiel ĝi nomiĝas ? La kamparano respondis : “En unu lingvo ĝi nomiĝas tiel, en iu alia alimaniere—*ma è un bicchiere e soltanto in italiano si chiama così*” (sed ĝi estas glaso kaj nur en itala lingvo ĝi tiel nomiĝas). Tiu respondo pravas, ke la nomo de aĵo en gepatra lingvo kuniĝas kun ties definitiva kaj unika vero, esenco, enhavo. La alta verdaĵo kiun mi nun vidas tra la fenestro, estas nek “Baum”o nek “arbo”o (mi devas devigi min pensi pri ĝi tiamaniere)—ĝi estas “arbo”. Tial “arbo” estas pli bela por mi ol “Baum”. Kaj tial “Baum” pli belas al Germano ol

¶ Agoro—foirejo, ĉefplaco.

“arbo”. Ni preterpasu la banalajn kvankam ĝustajn ekzemplojn de vortoj plenaj de absoluta emocia enhavo (patrino, amo, patrujo, nomo de la amatino aŭ amato) kaj tiajn aksiomojn kiel : “Die Sonne ne brilas kiel la suno” (Die Sonne—germ. la suno). Ni konsideru sonoron de lingvoj tute al ni nekonataj por ke—neŝarĝite de la signifo de vortoj—ni povu prijuĝi ilin nur laŭaŭde.

Unue ni aŭskultu amkanton havaian kaj ni konstatu senpartie kiom da simpleco kaj sentemo estas en tiuj ŝvebaj, fluemaj sonoj :

No ka mea, na aloha
Nui mai ke akua
I ko ke ao nei
Nolaila ua haavi . . .

Kiel tute alie sonas infana kantaĵo en la dialekto de tribo Iregŭe en Afriko ! Mallongaj, simplaj silaboj tuj transportas nin en gracion, naivan mondeton de babiletanta nigruleto :

Ba na ca nŭia ni
U nu nŭa koŭe bi
Bi nu ne nu
Gi bi ŭe zara nu . . .

Nun priskribo de tempesto en dialekto de unu el papuaj triboj. En la nekompreneblaj vortoj sonoregas murmuroj de tondroj, bruas ventego kaj minacas pendaj nuboj ŝarĝitaj de elektro :

God nou duriomoro gubugabu miri
magereri nou nauita adina mere
nouro gagiŭai inaroro ŭiroŭairi . . .
Kaj lasta ekzemplo—batala kanto de la tribo Luba-Lulua en Kongo :

Buala bua nzambi
ŭakatamba kusua
bo ha
bulo ba
jeje ŭakabaha muan andi . . .

Bruegas en ĝi tamburoj de la nigra popolo, nudaj piedoj de tatuitaj

militistoj batas la takton de l'batalo . . . Ĉu ne ?

Bedaŭrinde—ne ! Ree mi kulpas pri mistifiko: ĉiuj ĉi cititaj fragmentoj estas verso el Evangelio, la sama verso el Sta. Johano (III/16) : “Ĉar Dio tiel amis la mondon, ke Li donis Sian solenaskitan filon, por ke ĉiu, kiu fidas al li, ne pereu, sed havu eternan vivon”.

La legantoj pardonu min pro erarigo, sed mi volis montri ke tio kio estis “bela” aŭ “malbela” kiel amkanto aŭ batala kanto, kio estis sone ilustronta tempeston aŭ infanan babilon, subite iĝis io tute alia—tuj kiam ni ekkonsciis ties enhavon. Kaj se nun ni revenos al la *ba na ca nŭia* aŭ al la *buala bua nzambi*, ni perceptos la aŭdigatajn sonojn per tute aliaj “aŭdiloj”, ĉar ŝanĝiĝis la emocia atmosfero en kiu vivas la sonoj. Dum la dua legado solene kaj preĝe fluos la nekompreneblaj sonoj per kiuj ekzotaj popoloj gloras la Savanton. Kaj ĉiuj estos same belaj.

Katoliko, se li estas antisemito kaj konas nek la lingvon italan nek la judan, ĝuos sonojn de itala parolo, eĉ se ĝi konsistus el aĉaro de plej teruraj blasfemoj kaj kun abomeno li aŭskultos t.n. ĵargonon, eĉ se oni legus al li la plej subliman preĝon en tiu lingvo.

Favora—kaj laŭnature sonora—temo por lingvisto-fonologo estus la lingva karikaturado kaj parodio de diversaj popoloj. Tiaj mokimitoj estas komunaj al ĉiuj nacioj. Unu najbaro mokimitas paroladon de la alia opiniante ĝin “komika” (Polo la ĉeĥan), “malbela” (la judan) aŭ “malfacila” (la hungaran). Franco diras pri io nekomprenebla : *c'est du grec* (ĝi estas grekaĵo). France oni diras ankaŭ : *c'est de l'hébreu pour moi* (ĝi estas hebreaĵo por mi). Germanoj

diradas : *das sind mir böhmische Dörfer* (tio estas ĉeĥaj vilaĝoj por mi). Angloj : *that's Greek to me*, aŭ : *that's double Dutch to me* (tio estas greka al mi, aŭ tio estas duobla-nederlanda al mi). Al la itala : *parlo forse turco ?* (ĉu mi parolas turke ?) respondas la germana : *spreche ich vielleicht spanisch ?* (ĉu eble mi parolas hispane ?). La mala fenomeno estas ne nur nia : *przecież mówię po polsku* (mi ja parolas pole), sed ankaŭ la germana : *deutsch mit jemanden sprechen* (paroli kun iu germane ; komparu *deutlich*—klara, komprenebla) aŭ la franca *parler français* (paroli france)—la du lastaj frazoj signifas ankaŭ en pola lingvo “diri veron en okulojn” (malkaŝe). Same en angla lingvo *to talk plain English to a person* (paroli klaran anglan lingvon al homo) ; komparu *plane et latine loqui* (paroli simple kaj latine) ĉe Cicero. Por preskaŭ ĉiuj nacioj proverba iĝis la “ĉinaĵo”. Ĉeĥon oni nomas en Ameriko *bootchkey* de la ĉeĥa *počkej* —atendu momenton), francan lingvon—*parleywoo* (de la franca *parlez vous*—ĉu vi parolas). Germano nomas troan familiarecon *pallebratsch reden*—de la koruptita pola *panie bracie* (sinjor’ frato—arkaisma formo de patrone favora adreso; “esti kun iu je sinjor’ frato”—esti familiara kun iu). Multajn ekzemplojn de tiaj etnofaŭlismoj citas A. A. Roback en sia libro “A Dictionary of International Slurs”, Cambridge, Mass. 1944 (Vortaro de internaciaj ironiaj esprimoj).

Trad. kaj adaptis Marek Waysblum.

Eraro. Ni tre bedaŭras ke erara foto aperis super la nomo de John Francis sur paĝo 55. La ĝusta bildo aperos en la venonta numero.

P. E. Schwerin :

Strangaj Bestoj en Aŭstralio

EN la jaro 1770 la fama esploristo, Kapitano Cook, revenis al Anglujo post aventurplena vojaĝo al la Sudaj Maroj. Oficiroj kaj maristoj rakontadis pri la mirakloj, kiujn ili vidis en Nova Holando, kiel oni tiam nomis Aŭstralion. Ili priskribis bestojn de tiel eksterordinara aspekto kaj kutimoj, ke oni prenis tiujn rakontojn kiel nurajn fantazi-fabelojn, pro kiuj maristoj ja ĉiam estis konataj. Nur iom post iom, la scienco devis konfesi, ke ili tute ne mensogis.

Fakte Aŭstralio vidigas tre strangan bestaron (faŭnon); ĝi enhavas nombron da bestoj, kiuj ne plu ekzistas aliloke sur la tero. Ili estas

la post-vivuloj de besto-grupoj, kiuj en aliaj landoj pereis. Ili povis teni sin en tiu kontinento, ĉar ĝi estis izolita dum jarmiloj; pro tio ili evitis la konkuron de pli alte specialigitaj formoj.

Jam la *marsupialoj*, speciala grupo de mambestoj, prezentas multajn interesajn membrojn. Iliaj idoj estas naskitaj en tute senhelpa stato; ili estas tre malgrandaj—la ido de la kanguruo ekzemple estas nur kiel 3cm-longa fazeolo—kaj aspektas kiel gelato-buletoj, havas nek orelojn nek okulojn, nek verajn membrojn, nek haŭton aŭ harojn. La patrino besto posedas ĉe la ventro felkovritan faldaĵon, en kiu troviĝas la



Kanguruj

mampintoj. Al ili ŝi metas la idojn tuj post naskiĝo kaj fermas la poŝon. La pintoj ŝvelas en la buŝo de la idoj kaj tiamaniere malhelpas, ke tiuj defalas. Kelkaj marsupialoj portas la idojn pli ol duonan jaron en la poŝo, en kiu ili fariĝas kompletaj bestoj. Baldaŭ ili elrigardas scivole en la mondon; poste ili forlasas la sekurejon portempe kaj retiriĝas tien nur en danĝero aŭ dum malvarma vetero.

La plej konata reprezentanto de tiu grupo estas la **Kanguruo** (Makropo; macropus giganteus). Ties plej granda speco estas 3-metrojn longa kaj pli ol 2 metrojn alta. Tiu stranga besto neniam kuras, ĝi moviĝas nur saltante per helpo de la fortikaj malantaŭ-piedoj kaj de la fortmuskola vosto. Dum rapida vojaĝo ĝi kovras en unu salto 5-6 metrojn kaj povas transsalti barilon altan 3 metrojn. En ebena tereno ĝi kapablas moviĝi je rapideco po 50 kilometroj hore. Ĝi estas sentima batalanto kaj scipovas terure vundi siajn kontraŭulojn per la longaj ungegoj de la malantaŭaj piedoj. Kiam ĝi estas ĉasita de hundoj, ĝi rifuĝas laŭeble en riveron; tie ĝi ekkaptas la sekvantajn hundojn per la mallongaj antaŭpiedoj, subakvigas kaj dronigas ilin.


Alia, tipe aŭstralia marsupialo estas la **Koala-Urso** (Phascolarctus cinerus). La indiĝena nomo "Koala" signifas "neniu trinkaĵo" kaj estis donita, ĉar oni kredis, ke la besto neniam trinkas. Verdire ĝi ricevas fluidaĵon sole el la delikataj folietoj de certaj eŭkalipto-arboj, da kiuj ĝi manĝas grandegan kvanton. Verŝajne pro tiu malfacile digestebla nutraĵo, la besto havas apendicon $2\frac{1}{2}$ metrojn longan. Kovrita de mola mallonga felo, la ĉarma besteto atingas longecon de nur 60cm kaj grimpas tre malrapide; ĝi estas pacema kaj



Koala-Urso

trankvilanima. La ino naskas unu idon ĉiun duan jaron. Neniam en trorapideco, la koala-patrino portas ĝin sur la larĝa brunfela dorso; aŭ tenas ĝin protekte kaj dorlote per la brakoj kontraŭ la fronto de sia korpo. Dum kelkaj monatoj la novnaskito ne forlasas la poŝegon de la patrino; nur post duona jaro ĝi fariĝas memstara, sidas dumtage en komforta branĉo-forko de eŭkalipto, al kiu ĝi ĉiam revenas post nokta manĝado sur pli altaj branĉoj.



Specialan lokon en la faŭno de Aŭstralio okupas la **Platipo** (Ornitorinko; ornithorhynchus paradoxus). Kiam vojaĝantoj unue raportis pri ĝi, oni ne kredis, ke tia vivaĵo povus ekzisti. Ĝi estas felkovrita mambesto, sed ĝi demetas ovojn kun pergamen-simila kovraĵo; ĝi havas naĝ-membranojn ĉe la piedoj, kaj bekon

*Platipo*


kiu similas al tiu de anaso ; timema kaj laŭfigure kiel talpo, ĝi havas nek orelojn nek dentojn. La beko estas ronda kaj mola, kaj enhavas bonan provizon da nervoj por sentado kaj flarado. Vivante en riveroj, ĝi traserĉas per la beko la ŝlimon de la grundo kaj de la bordoj kaj nutras sin per la tie trovitaj moluskoj, insektoj kaj vermoj. Ĝi elfosas 30 metrojn longan kaŝejon, en kies neston el eŭkalipt-folioj, herboj k.t.p. ĝi demetas 2-3 ovojn. La vira besto posedas du akrajn spronojn ; ili elstaras el la kalkanoj de la malantaŭaj piedoj kaj kuniĝas al veneno-glandoj. Vundo kaŭzita de tia sprono estigas dolorigan kaj danĝeran ŝvelaĵon, sed kutime la bestoj estas neniel atakemaj.

En la regno de la aŭstraliaj birdoj certe la plej populara estas la

Kookaburra (Ridanta alciono ; alcedo gigantea). Ĝi distingiĝas precipe per sia krio, kiu sonas kiel longdaŭra, ripeta, homa ridado. Ĝi eligas ĝin prefere en la frumatenaĵoj kaj pro tio estis nomita ankaŭ la “horloĝo de la farmisto”. La belkolora birdo fariĝas tre malsovaĝa kaj fidema, kaj havas rigardon de iu ruza, bonhumora saĝulo. Fakte ĝi estas iom fripona, forrabas la idojn el la nestoj de aliaj birdoj. Kvankam ĝi vere estas giganta alciono, ĝi preskaŭ neniam fiŝkaptas ; ĝi nutras sin de lacertoj, ratoj, musoj, birdoj, insektoj kaj larvoj, kaj fervore atakas kaj mortigas serpentojn. Sed tiun maldelikatan flankon de la vivo oni forgesas, kiam ĝi sonigas sian elkoran infektan ridadon, kaj vole-nevole oni devas kunridi.

*Kookaburra-birdoj**Emuo*

La plej granda birdo, krom la struto, estas la **Emuo** (*Dromajo* ; *dromaius novae hollandiae*). Malhelbruna kaj 2 metrojn longa, ĝi havasflugilojn, sed ne povas flugi. La plumoj estas strangaj, similas al haregoj kaj eliĝas po du el unu radiko. Same kiel la kamelo, la birdo povas trinki grandan kvanton unutempe kaj poste vivi per ĝi dum tagoj. Ĝi vojaĝas je granda rapideco, ĝis po 50 kilometrojn hore, kiun oni kontrolis per aŭtomobilo. En vintro ĝi demetas 7-8 ovojn en la sablon, sen prepari iun neston ; la vira birdo kovas ilin dumtage kaj ankaŭ poste gardas kaj prizorgas la idojn. Ĉar oni kredis, ke la birdo disvastigas per siaj longaj vojaĝoj la semojn de malutila planto (pikeca piro), ĝi estis grandskale ĉasita kaj buĉita, kaj nun estas verŝajne pereonta.


*Liro-Birdo*

La fotoj estas disponigitaj al ni de la *Australian News and Information Bureau*, al kiu ni esprimas sinceran dankon.

Eble la plej bela birdo en la mondo estas la **Liro-Birdo** (Menuro; menura superba). Kiam vi havas okazon observi la viran birdon kaŝe en ĝia favorloko, ĝi havigos al vi kompletan prezentaĵon de dancado kaj kantado. Kvazaŭ vibranta arĝenteca vualo, la vosto leviĝas super la kapo, dum la liro-plumoj estas zorge etenditaj. Antaŭen kaj reen moviĝas la gracia birdo kaj montras ĉiujn movojn kaj specialaĵojn de sia dancarto. Samtempe ĝi aŭdigas sian strangan kantmanieron, imitas tre lerte la kantkriojn de aliaj birdoj kaj aliajn aŭditajn sonojn; ekzemple la bruon

de trunk-hakado, de martelado, la bojadon de hundo, la sonon de aŭtomobil-korno kaj multajn aliajn.

Ekzistas multaj aliaj strangaj kaj interesaj bestoj en Aŭstralio: flugantaj didelfoj, kiuj akrobate glitflugas kaj paraŝutas helpe de ĉe-flankaj membranoj; ruĝet-krestaj kakaduoj, kiuj amasiĝas en rozkoloraj nubetoj; nigraj cignoj majeste naĝantaj; komike aspektaj pingvinoj; nigre-kolaj cikonioj; krokodiloj, serpentoj, gigantaj lacertoj, gekoj, testudoj, brilkoloraj papilioj, termitoj, kaj la tuta miraklo-mondo enmara ĉe la Granda Bariera Koralo-Rifo.



Enigma Konkurso N-ro 76

Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento. Limtempo por Eŭropo estas du monatoj.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkuponon internacia.

Solvoj

N-ro 167 : panter - ferdek - baston - marŝal - rosmar.

N-ro 168 : klafto - sekalo - kuseno - sturno - latuno - mitulo - armilo - prismo - pasero - sterko - kiraso - aresti - striko - karesi - soriko - lariko - barako - raketo - kafejo - klafto.

N-ro 169 : asekuri - aspekti - aspergi - eksporti - eskorti - esprimi - estingi - importi - inspekti - instrui - kompari - kompati - kompensi - kompreni - konspiri - konstrui - konsumi - korupti - mensogi - narkoti - promeni - promesi - rakonti.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 72-a konkurso: S-ro A. C. Coutinho (Braz) 159, S-ro P. E. Schwerin (Aŭstralio) 153, S-ro Chr. F. W. Slijper (Ned) 145 p.

Enigmo N-ro 173 : Forprenu unu literon el ĉiu el la ĉi-subaj vortoj, kaj faru novan vorton el la restantaj literoj de ĉiu vorto. La forprenitaj literoj de vas formi en la donita sinsekvo esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof. Splito, sterko—ateisto, minareto, klafto, sitelo, instruo, plateno, persono, montri, energio, averti, sufikso, klimato, kranio, stameno, koverta, diveni, kliento, peonio, pensio, vipuro.


Enigmo N-ro 174: La tuto konsistas el 100 literoj, kaj estas devizo, kiu troviĝis ie en nia revuo. Unu

ekstran poenton por tiuj, kiuj trovas la aŭtoron kaj la lokon, kie troviĝas tiu devizo.

44-58-90-94-5-69-89-31-91, post Adamo ĉiuj homoj bezonas tiujn metiistojn. 74-9-37-53-4-67-20-98-62, frandaĵo. 43-65-6-51-75-60-48-28-57-13-50, post la milito ekestis multaj tiaj homoj. 96-81-79-1-41-83-7-88-23, konfitaĵo. 38-36-85-3-61-22-95-17-86-21, oni ĝin konservas de gravaj dokumentoj. 10-49-24-80-15-8-76-100-40, ili muzuras 1852 metrojn. 11-26-29-73-63-2-99-70-32-72-55-14, ili instruis sin mem. 42-18-34-45-46-97-56-71, lernantoj uzas ilin en la lernejo. 27-64-87-22-24-93-92-5, tago. 67-78-37-12-54-16-29-2, energie daŭrigi. 77-25-79-1-30-53-4-54-19-17-13, apotekisto. 33-91-39-6-52-35-23, tropika frukto. 47-84-69-32-9-66-74-55, akra moko. 59-68-82, cifero.

Enigmo N-ro 175 : Reordigu la ĉi-subajn litergrupojn tiel, ke vi trovas kvin esprimojn el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

1. elo - elo - ira - lmi - net - ona - oni -
ror - spe - urs.
2. atr - inc - ino - itu - nne - one - onp -
udu - urs - vit.
3. det - fre - ĝuu - mda - nne - nvi -
ruu - sed - via - von.
4. agi - evi - gos - iev - ipa - kon - nsc -
sci - sen - sko.
5. anĝ - gos - igo - inm - nki - smi -
tri - vim - vin.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horosistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso—kutime 1 horon.
Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Mardo	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 13.94m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 225m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV, Aŭstrujo.
	21.45–22.15	Valencia. 43m. P. Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m., 188m. I.M. V.A.R.A., Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Ĵaŭdo	07.40–07.45	Lille. 218m. I. Prof. Labit, 1 rue St-Martin, Lille (Nord), Francujo.
	08.30–08.45	Paris. 348m. K. Esperanto-Office, Orléans (Loiret), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 298m. P. (6-III, 17-IV). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	22.15–22.20	Hilversum. 298m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Svisa Radio. Ni memorigas niajn legantojn, ke la mardaj paroladoj de D-ro Baur per la stacio Bern okazas dum la vintro laŭ jena skemo :

- 1-an mardon : komentario pri internacia politiko.
- 2-an „ komentario pri svisa politiko aŭ evento.
- 3-an „ komentario pri kultura temo.
- 4-an „ novaĵoj el Esperantujo kaj leterkesto.
- 5-an „ nefiksita temo.

Krome la interesaj paroladoj de D-ro Privat estas aŭdeblaj ĉiuĵaŭde.

Hispana Radio. Niaj hispanaj samideanoj atentigas la aŭskultantojn de Radio-Valencia pri la efiko de “leter-bombardado” de ĉi tiu stacio. Sendu viajn gratulojn kaj raportojn pri aŭdebleco al la Programestro de Radio Alerta, Colón 11, Valencia, Hispanujo. La fakto, ke tiu stacio estas ŝtata organizaĵo multe kontribuos al la daŭra plifirmigo de nia movado en la lando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 247

2-an de Februaro 1953

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Januaro, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1952 :

	1952	1953
Asociaj membroj	1087.	1812
Individuaj membroj :		
MJ 362	345	
MA 2132	2113	
MS 313	372	
Patronoj .. 7	5	
DM 256	259	
HM 57	58	
	— 3127 —	3152
	4214	4964

JARLIBRO. La unua parto de la jarlibro eliris en la fino de januaro. Paginto kiu ne ricevis sian ekzempleron bonvolu sciigi al la Centra Oficejo.

DELEGITOJ

Britujo

Bathgate (Skotlando). D : W. A. Gibson, Boghead House.

Colchester. VD : vakas.

Darwen (Lancs.). D : W. Grice, 11 Bury Street.

London. D kaj FD (Socikredito) : vakas.

Danlando

Odense. VD kaj FD (Literaturo) : vakas.

Sierslev. D : vakas.

Finnlando

Jyväskylä. VD : J. E. Leppäkoski, Vapaudenk. 42.

FD (Ĵurnalismo) : La VD.

Francujo

Velleuxon (Haute-Saône). FD (Katolikismo) : La D.

Gabono

Port-Gentil. D : A. Courtis, Boîte postale 235, Port-Gentil, Gabon, Fr. Ekv. Afriko.

Hispanujo

Barcelona. FD (Kooperativismo) : P. Claramunt, C. Teruel 26.

Eibar. D : S. Arizmendi, Ardanza 9—I. Tel : 72227.

Japanujo

Osaka. D : Seitaro Ŝindo, 1009 Koonoike, PO Suminodo, Osaka.

FD (Inĝenieraj aferoj) : Ŝinzo Sumija, Ŝinmeiĉo 48, Kitaku.

FD (Ĵurnalismo) : C. Fujima, The Press "Asahi Ŝimbun", Nakanoŝima, Kita-ku.

FD (Virinaj aferoj) : F-ino Satori Kita, 72 Sieizyutaku, Kitaôgimati, Kita-ku.

Jugoslavujo

Beograd. FD (Komerco) : I. Grahovac, Carice Milice 13. Tel : 29.456.

Koprivnica. FD (Agronomio) : T. Gregurek, Starogradska 4.

Kenjo

Eldoret. D : J. Williamson, P.O. Box 521.

Maroko

Sidi-Yahia du Rharb. D : Fernand, Cazaudarré, agrikulturisto.

Meksikio

Mexico. FD (Filatelo) : R. Rübsamen, Independencia 64—I. Tel : 13-88-17.

Nederlando

Maastricht. D : H. Perry, Notgerusweg 25.

Peruo

Trujillo. D : José Del Pino, Calle Salaverry 392.

Portugalujo

Marinha Grande. D : J. Saraiva Martins, Av. Conde de Azarujinha 42.

FD (Naturismo) : La D.

Svedujo

Älvängen. D : A. H. Tähtinen, Knaptorp 422.

Nora Stad. D : K. O. Sandgren, Klackavägen. Tel : Klacka-Lerberg 65.

Venezuelo

Maracay. D : J. V. Espinoza, Av. Principal 40, San Agustin. Tel : 2314.

NOVA DUMVIVA MEMBRO

Mullin, F-ino B. E., Philadelphia, Pa., Usono

PATRONOJ 1953

5. Toms, S-ro C. H., Freshwater, Anglujo

MEMBRO-SUBTENANTOJ 1953

251. Kind, S-ro E., Bonn, Germanujo
252. Berger, S-ro J. G., München, Germanujo
253. Dresselhaus-Brockmann, S-ro H.,
Schloss Holte, Germanujo
254. Gerwin, S-ro R., Löbberich, Germanujo
255. Lanka, F-ino H., Hamburg, Germanujo
256. Renken, D-ro C., Bremen, Germanujo
257. Teltz, S-ro F., Gelsenkirchen,
Germanujo
258. Wolff, F-ino A., Rendsburg, Germanujo
259. Miralles, S-ro E., Valencia, Hispanujo
260. Cunningham, S-ro W., West Wemyss,
Skotlando
261. Edwards, S-ro G. D., London, Anglujo
262. Eldon, S-ro H. B., Southport, Anglujo
263. Gibson, D-ro W. A., Bathgate, Skot-
lando
264. Walke, S-ro D. H., Loddiswell, Anglujo
265. Clark, S-ro J., Crook, Anglujo
266. Lundgren, S-ro A., Hälsingborg,
Svedujo
267. Edler, S-ro P., Lund, Svedujo
268. Cazaudarré, S-ro F., Sidi-Yahia du
Rharb, Maroko
269. Rousseau, S-ro H., Mazagan., Maroko
270. Christensen, S-ro N., Hamar, Norvegujo
271. Haave, S-ro C., Brumundal, Norvegujo
272. Breth, S-ro F. W., Petrolia, Penn.,
Usono
273. Solzbacher, S-ino R., Yonkers, N.Y.,
Usono
274. Solzbacher, D-ro W., Yonkers, N.Y.,
Usono
275. Sumner, S-ro F. H., Bay City, Ore.,
Usono
276. Vedder, S-ro F. W., Miami, Fla., Usono
277. Futran, S-ro J., New York, N.Y., Usono
278. Weile, S-ro K., Kolind, Danujo
279. Hansen, S-ro J. S., Lyngby, Danujo
280. Møller, S-ro P., Viborg, Danujo
281. Trier, S-ro B. S., Haslev, Danujo
282. Hoekma, S-ro A., Den Haag, Neder-
lando
283. Knol, D-ro G. T., Coevorden, Neder-
lando
284. Pannenburg, S-ro R., Nieuwe-Pekela,
Nederlando
285. Vidack, S-ro J., Seattle, Wash., Usono
286. Jobbins, F-ino A. F., Tunbridge Wells,
Anglujo
287. Boge, S-ro E., Högsby, Svedujo
288. Cooper, S-ro B., Boras, Svedujo
289. Ancliffe, S-ro J., Scunthorpe, Anglujo
290. Bean, D-ro C. M., London, Anglujo
291. Finbow, S-ro A. L., London, Anglujo
292. Goulding, S-ro C., Stoke-on-Trent,
Anglujo
293. Hammond, S-ro R. E., Coventry,
Anglujo
294. Jordan, S-ro H., Brighton, Anglujo
295. Miskimmon, S-ro W. A., Hamilton,
Skotlando
296. Peacock, S-ro A., London, Anglujo
297. Ridpeth, S-ro T. H., London, Anglujo
298. Zeiner, S-ro B. R., Barry, Kimrujo
299. Lomo, S-ro A., Glen Oaks, N.Y., Usono
300. Sayers, S-ino E. T., Brooklyn, N.Y.,
Usono
301. Sayers, S-ro J. D., Brooklyn, N.Y.,
Usono
302. Grocott, S-ro J. R., Blackburn, Anglujo
303. Mitschke, S-ro F., Paterson, N.J., Usono
304. Harvey, S-ro J., Glasgow, Skotlando
305. Ramsay, S-ro C., East Devonport,
Aŭstralio
306. Bull, F-ino E. M., West Leederville,
Aŭstralio
307. Thomson, S-ro R., Kalamunda,
Aŭstralio
308. Barbieri, S-ro R. A., Montevideo,
Urugvajo
309. Klein, S-ro A., Montevideo, Urugvajo
310. Estrebou, S-ro J., Meknès, Maroko
311. Lecoeur, S-ro P. G. C., Rabat, Maroko
312. Carlioz, S-ro, Khemisset, Maroko
313. Hansen, S-ro E., København, Danujo
314. Coss, S-ino C. L., Burlingame, Cal.,
Usono
315. Rodrigues, S-ro F. L., Porto, Portugal-
ujo
316. Somerville, S-ro H. T., Bolton, Anglujo
317. Jensie, S-ino M., Jönköping, Svedujo
318. Lindberg, S-ro T., Prässebo, Svedujo
319. Turner, S-ro F., Linköping, Svedujo
320. Norvall, S-ro K., Trondheim, Norvegujo
321. Jensson, S-ro A., Oslo, Norvegujo
322. Myrvoll, S-ro M., Nygardsjøen,
Norvegujo
323. Skogstrøm, S-ro G., Drammen,
Norvegujo
324. Skogstrøm, S-ino L., Drammen,
Norvegujo
325. Kolstad, S-ro A., Trondheim,
Norvegujo
326. Molera Pedrals, S-ro R., Moya,
Hispanujo
327. Cochrane, F-ino I. M., Dunfermline,
Skotlando
328. Llinàs, S-ro A., Santa Cruz, Kanarioj
329. Wong, S-ro C. S., Penang, Malajo
330. Dusauso, S-ro J., Paris, Francujo
331. Keller, S-ro A., La Celle-St. Cloud,
Francujo
332. Lienhardt, S-ro A., Mulhouse, Francujo
333. Llech-Walter, S-ro R., Perpignan,
Francujo

334. Poly, S-ro P., Paris, Francujo
 335. Courtis, S-ro A., Port-Gentil, Gabono
 336. Bridger, S-ro H. J., Bexleyheath, Anglujo
 337. Cather, S-ro W. A., Torquay, Anglujo
 338. Edmondson, S-ro E., Bingley, Anglujo
 339. Thurgood, S-ro F., London, Anglujo
 340. Trickey, S-ro R., Surbiton, Anglujo
 341. Ericson, S-ro A., Sköldinge, Svedujo
 342. Johansson, F-ro A., Hälsingborg, Svedujo
 343. Stenström, S-ro J., Jönköping, Svedujo
 344. Schmidt, Pastro A., Graz, Aŭstrujo
 345. Skole, S-ro S. B., Hjørring, Danujo
 346. Kempeneers, D-ro P., Bruxelles, Belgujo
 347. Boffejon, S-ro H., Antwerpen, Belgujo
 348. De Mot, S-ro R., Bruxelles, Belgujo
 349. Ronda, S-ro J., Meknès, Maroko
 350. Vieira de Araujo, D-ro A., S. João, Portugalujo
 351. Olsson, S-ro O., Lund, Svedujo
 352. Olsson, S-ro S., Strömsnäsbruk, Svedujo
 353. Schöllin, S-ro O., Dyltabruk, Svedujo
 354. Haas, S-ro P., Maribor, Jugoslavujo
 355. Maurice, S-ro P., Tanger, Maroko
 356. Qillivic, S-ro J., Marrakech, Maroko
 357. Preedy, S-ro G. L., Gloucester, Anglujo
 358. Appleby, S-ro C. I., Nottingham, Anglujo
 359. Ashworth, S-ro H., Liverpool, Anglujo
 360. Bishop, S-ro W. O., London, Anglujo
 361. Blacklock, S-ro A. L., Ipswich, Anglujo
 362. Blacklock, S-ro L. E., Parkstone, Anglujo
 363. Robinson, F-ro E., Pickering, Anglujo
 364. Seddon, S-ro R., Southport, Anglujo
 365. Tweedie, S-ro O., Bournemouth, Anglujo
 366. Atkinson, S-ro W. G., London, Anglujo
 367. Collins, S-ro E., Hamilton, Ont., Kanado
 368. Schiavi, S-ro V., Masaka, Ugando
 369. Culbert, S-ro S. S., Seattle, Wash., Usono
 370. Bink, F-ro A. B. M., Rotterdam, Nederlando
 371. Donner, S-ro W. A., Bedford, Ohio, Usono

DONACOJ. D-ro A. V. Araujo 5ŝ., O. Bünemann 10ŝ., A. Lomo 40ŝ., F-ro I. M. Cochrane 5ŝ., E. P. Crabtree 1ŝ. 6p., S-ro E. Turnbull 3ŝ.

Donacoj al la Propaganda Konto. M. Lewin 12ŝ., E. Carlén 100ŝ., M. Pearson 10ŝ., C. Jervis 10ŝ., Fife Studrondo 7ŝ.

Sincera dankon al ĉiu helpanto.

C. C. GOLDSMITH, *Sekretario.*

Esperantista Vivo

Naskiĝo

Alexander. Al Ken kaj Naomi Alexander (40 Mount Road, New Malden, Surrey, Anglujo) naskiĝis filino, Heather Jane, la 27-an de januaro 1953.

Gefianĉiĝo

Reed-Sly. Gefianĉiĝis Sybil Reed, Del. en Letchworth, Britujo, Sek. de la Sud-Mezlanda Esp. Federacio, kaj Kenneth Sly, antaŭe VD en Slough, Anglujo.

Al ĉiuj ni esprimas nian sinceran gratulon.

Niaj mortintoj

Ni eksciis pri la forpaso de la jenaj samideanoj al kies parencoj ni volas esprimi nian profundan kondolencon.—Red.

Davey, F-ro Rose, en Londono, Anglujo, forpasis la 6-an de februaro 1953. Inter la plej viglaj agantoj en Anglujo, ŝi estis dum multaj jaroj sek. de la Londona Klubo, membro de la administra komitato de BEA, kaj VD de UEA.

Glodeau, S-ro L., Parizo, Francujo, kunfondinto de S.A.T., sindona batalinto en laborista medio por Esperanto, forpasis 13-an de novembro 1952.

Pfeiffer, S-ro Karl, dum pluraj jaroj inter dumilitaj, D. de UEA en Aschaffenburg.

Rodo, Ludovic, pentristo kaj gravuristo en Parizo, filo de Camille Pissaro, unu el la ĉefoj de la skolo impresionista.

Schendeler, Paulus Antonius, Eindhoven, Nederlando, 74 jara, forpasis 23.1.1953. Estinta prezidanto de I.K.U.E. Kursgvidinto kaj tradukinto, defendinto de simpla Esperanto.

Susak (*de paĝo 91*)

kun granda rapideco al la lumturo
 serĉante ripozon sed trovas tie . . .
 morton, frakasigante kontraŭ la turo.
 Iafoje amasiĝas antaŭ la lumturo
 tiom da birdoj ke la insulanoj ne
 povas manĝi la tutan kaptaĵon.
 Tiam ili pekias ilin.

ANONCETOJ

Kosto : du pecoj por ĉiu vorto, aŭ internacia respondkupono por ĉiu duo da vortoj.
Ĉiu anoncanto morale devigas sin respondi minimume unu fojon al ĉiu kiu skribas.
Anonceto por iu numero devas atingi nin antaŭ la 6-a de la antaŭa monato.

Mi vidis liajn vojojn, kaj Mi lin sanigos ;
Mi kondukos lin kaj redonos konsolon al li
kaj al liaj plorantoj. *Jesaja 57. 18.*

Internacia Kultura Semajno, 3-10 Aŭgusto 1953 en Kultura Esperanto-Domo, Grésillon. Informas detale kontraŭ internacia respondkupono G. Odent, Lycée de LAON, Aisne, Francujo. Represo petata.

Redaktoro de komerc reklamarta gazeto deziras interŝanĝi materialojn pri komerc-reklamo, ekz. afiŝojn, pamfletojn, kestetojn. Resp. garantiata. S-ro Waki Seikiti, "La Presarto", Kitahama 4-55, Higasi-ku, OSAKA, Japanujo.

Ne-katolikaj, kiuj deziras informojn pri la katolika kredo, povas ricevi ilin senpage de la Internacia Katolika Informejo. Sekretariejo: Fraterhuis, LOONOPZAND, Nederlando

Deziras korespondi 15 gelernantoj kun gesamideanoj tutmondaj. Skribu tuj al S-ro N. H. Naylor, 8 Greenland Villas, Queensbury, BRADFORD, Yorks., Anglujo.

Kultura Esperanto-Domo akceptos laŭeble de junio ĝis septembrofinon ĉiulandajn Esperantistojn. Eventuale iam ajn ankaŭ karavanojn. Informpeto sendota kun internacia respondkupono al Kultura Esperanto-Domo, Grésillon, BAUGE, M-et-L., Francujo. Represo petata.

Deziras korespondi kun gesamideanoj pri ĉiuj temoj, nepre respondos, Kandai Esperanto-Societo, Kansai Daigaku, Suita, Osaka, Japanujo.

Vegetarano esperantista, 46-jara, Eŭropano, deziras korespondi kun vegetaranoj tutmonde. Jozefo Tamás, Rua Anastacio 267, LAPA, Sao Paulo, Brazilo.

E. Eusebione, 3 Scimula Str. (Villino Alberta), TRIPOLI, Afriko, deziras korespondi kun tutmondaj meminstruitaj pasiaj matematikistoj pri interesaj temoj kaj problemoj. Nepre respondos.

Esperantistaj Naturamikoj organizos letervesperon la 31-an de marto. Adresu al S-ano Ch. Vermeir, Churchill-laan 165, Schoten-ANTWERPEN, Belgujo. Almenaŭ per bildkarto rekompencos.

Vicenc Garcia, Valle 9, TARRASA, Hispanujo, deziras korespondi kun Azio, Afriko kaj Oceanio ; ĉiam, ĉien, ĉiel, ĉial respondos.

UEA-delegito deziras organizi Esperantan montrejon. Bonvolu sendi ĉion rilate al nia movado ĉu esperante ĉu nacilingve al Faruk Abul-Dahab, Amerika Universitato de Bejruto, P. K. 131, BEIRUT, Libano.

Aĉetas kaj interŝanĝas poŝtmarkojn. Skribu multnombre, ĉiu oferto bonvena. Respondas ĉiam, leterojn afrankas per UNO-pm. Adreso : Myron R. Mychajliw, 170 Avenue B, NEW YORK 9, N.Y., Usono.

La Klubo de la dua urbo en Britlando invitas salutleterojn kaj bildkartojn por letervespero Majo 16-an. Respondo garantiita. Adreso sekretaria : S-ro D. Langman, 375 Stratford Road, Shirley, BIRMINGHAM, Anglujo.

Prestwich Esperanto-Societo okazigos letervesperon fino de Aprilo 1953 kaj invitas Esperantistojn ĉiulandajn sendi korespond-aĵojn. Nepre respondos. Sekretariino : Agnes Dean, "Nia Hejmo", 67 Butterstile Lane, PRESTWICH, Nr. Manchester, Anglujo.

Haltu momenton! Ni estas 10 komencantoj, kiuj petas vin skribi al nia letervespero, kiu okazos la 15-an de aprilo 1953. Adreso : "Frateco", G. Persson, Berzelius Plats 1, HÅLSINGBORG, Svedujo. Antaŭdankon. Respondo garantiita.

Bournemouth. Brita Esperanto-Kongreso, Pentekosto. En la altnivelaj Varietea kaj Arta programoj partoprenos Prof. D-ro **Lapenna** (se en Anglujo), **Frank Merrick**, nia fama pianisto, **Reto Rossetti**, aŭdinda ĉiam. Aliĝilo ĉe W. Laurie, Hon. Sek., 6 Marlborough Road, BOURNEMOUTH, Anglujo.

Angla farmaciisto, 45-jaraĝa, volas korespondi esperantlingve aŭ anglalingve kun samideanoj eksterlandaj pri iaj temoj. Nur letere, mi petas. F. C. Bailey, M.P.S., 18a Booths Farm Road, BIRMINGHAM 22a, Anglujo.

Belga Fremdultrafika Servo, Konijnenperken 109, BOSVOORDE-BRUSSEL, Belgujo, rezervas hotelĉambrojn, dissendas turismajn prospektojn (1 rpk.). Rekomencos pro publikigo.

Korespondas pri kontraŭ-alkoholismo S-ro Alpo Suomalainen, Sorniemi, PUUMALA, Finnlando.

Ĉeĥoslovaka samideano deziras interesan korespondadon kun geamikoj ĉiulandaj. Certe respondos. Bohuslav Novotny, HLUŠOVICE 48 u Olomouce, pp. Bohunovice, Ĉeĥoslovakujo.

Japanaj 2000-geklubanoj deziras korespondi kaj interŝanĝi pm. pk. gazetojn. Esp. Koresponda Klubo, Oka (HIRAKATA CITY), Osaka, Japanujo.

HELSINGÖR

Internaciaj Feriaj E-kursoj

18-25 de julio

Konversacia kurso, prepara kurso por Cseh-metodaj geinstruontoj. Daŭriga kurso, k.t.p.

Unu semajno inter centoj da gesamideanoj el 10-15 diversaj landoj. Prospekto senpage havebla ĉe

L. Friis,

Ingemannsvej 9,

Aabyhøj, Danlando.



MAJSTROVERKO DE LA MONDLITERATURO

IBSEN: PEER GYNT

El la norvega tradukis E. A. Haugen

Prezo : bind. 15 ŝil., broŝ. 12ŝ. 6p., afranko 9p.

Eldonis : ELDONA RONDO,
Boks 178, Trondheim, Norvegujo

Mendu ĉe via librovendisto aŭ ĉe
U.E.A., Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

MALGRAŬ ĈIO — KANTU !

Vi povas posedi la muzikon kaj vortojn
de 33 bonaj popularaj kantoj se vi aĉetos

KOMUNAN KANTLIBRON

de H. W. kaj N. HOLMES

Prezo aŭfrankite 2ŝ. 3p. aŭ 7 int. rpk.

Eldonita de

THE ESPERANTO PUBLISHING COMPANY LTD.

Mendu ĉe enlanda libroservo aŭ ĉe

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

